Nun post preskaŭ 25 jaroj spirado en Esperanto sfero, li pensas:*"Emfazo devas esti sur instruado kiu estas preterlasita pere de respondeculoj kaj regantoj de organizaĵoj. Atingi atestilojn estas tre malfacile kaj multekoste por interesatoj precipe por junuloj. Malgraŭ tio ke iam estis anoncite ke pere de Komenius universitato neĉeestantoj povus studi Esperante diversajn fakojn kaj akiri atestilon."*

Mia plej interesa memoraĵo

La plej interesa memoraĵo kiun mi rememoras pri Majstro Azari okazis dum komuna esperantista montgrimpado sur la monto Sabalan en 1997. Mi tre miris vidante lin facile grimpantan kun ni malgraŭ tio ke li aĝis duoble kompare kun ni. Mi malsaniĝis je montmalsano sed li ŝajne ne havis problemon dum nia restado en alteco de 3000 metroj.

D-ro Kejhan Sajjadpur

En la jaro 1994 pere de d-ro Hosejn Vahidi mi konatiĝis kun d-ro Mohammad Pezeŝki kiu tiam en sia kabineto ĉiu-semajne okazigis E-rondon. Laŭ la invito de d-ro Pezeŝki mi ĉeestis en ilia semajna rondo kaj tie por unua-fojo mi konatiĝis kun s-ro Azari.

Mi prezentis al la rondĉeestantoj nian tiaman organizaĵon IREJO-n, s-ro Azari demandis min pri la signifo de IREJO kaj mi klarigis al li la signifon, poste li diris "Do, kio por maljunuloj kiel mi? Eble ni devus krei PIREJO-n" (Mi devas klarigi ke "pir" en la persa signifas "maljuna") kaj s-ro Azari kritikŝerce alparolis min, ke dum ne ekzistas landa asocio vi fondis junularan organizaĵon ….

Ĉiukaze dank· al sorto mi konatiĝis kun s-ro Azari de kiu multon mi lernis kaj vere li influis al mia animo diversflanke. Lia agmaniero kaj juĝmaniero pri aliaj personoj estis la plej bona leciono kiun mi akiris de li. Mi ja kredas ke post konatiĝo kun li nia radikala organizaĵo (laŭ agminero) jam komencis ektrovi ekvilibron kaj pli saĝan agmanieron kiu finfine varbis al si la aĝulojn de la movado kaj tiel fondiĝis "Irana Esperanto-Centro" kiun ni anime ŝuldas al nia kara Azari.

Lia lernemo al mi ĉiam ŝajnis valora kutimo: dum en nia socio oni ŝajnigas sin "ĉio-sciaj", personoj kiel s-ro Azari tiom sinceraj kaj tiom amikaj vere estas malmultaj, tiel sinceraj kaj tiel amikaj.

Konatiĝo kun s-ro Azari estis unu el la plej bonaj ŝancoj kiun donacis al mi la vivo! Reza Torabi

Kiu dediĉis vivparton de si

Simin Emrani

Mi memoras la 18an de novembro 1998 kiam e-grupo iris ekster Tehranon okcidenten al vilaĝo *Sangan* kiu havas tre belajn montetojn kaj valojn. Tre sorĉanta aŭtuno puŝis homon al kaj en pejzaĝoj(n). S-ro majstro Azari post multaj jaroj partoprenis tiun ekskurson. Li parolis pri sia libro Esperanto-Persa vortaro kies verkado daŭris 20 jarojn. Li dediĉis tiujn jarojn de sia vivo pacience kaj favore al E-o movado en Irano. Mi donacas ĉi- kanton kiun en *Sangan* mi faris:

Amikeco

Ni ĉiuj promenas en arbaro
Kaj hirundoj kiuj flugas for
La suno ridante al ni brilas
Kun ĝojo kaj amo en sia kor'

Ni ĉiuj grimpas sur montaro
La ĉielo rigardas bel-blue
Aŭtunaj folioj falas flave
Aŭdiĝas milda kanto susure

En nia kor' krias forte
amikeco
Trairas la espero tra la mond'
En la fino ni ĉiuj kune kantos
Pri l' homo, amo, frateco
Beleco, amikeco, amikeco

Kiam s-ino Ahmadnia proponis min partopreni en iu rondo en domo de s-ro Azari kies celo estis traduki PIVon (Plena Ilustrita Vortaro) al la persa lingvo, mi konsiderante la volumenon de tiu libro iomete hezitis akcepti tiun proponon. Sed kiam mi unuafoje partoprenis en la rondo mi hontis rigardante la laborvolumenon sole faritan de s-ro Azari. Fakte nur la reviziado de tiu bone ordigita tradukaĵo ne estis kompleta. Mi komencis daŭrigi revizadon helpe de gesinjoroj Ahmadnia kaj Mamduhi kiu kelkfoje estis ripetita pro peno de s-ro Azari prepari la plej eble ĝustan, kompletan verkon. Tamen mi ne havis ian opinion pri la graveco de la afero kaj ne sciis kiom longe ĝi daŭriĝos. Finfine nur s-ro Azari sola havis tian persiston kaj paciencon por fini tiun grandan, valoran laboron. Tiuj kiuj jam havis sperton en preparado de vortaro, povus pravigi min pri seriozeco kaj precizeco bezonataj por tia afero kio iĝis farebla per s-ro Azari.

Tiel mi trovis tiun ŝancon konatiĝi kun s-ro Azari kiu vere estis tre valora oportuno por mi kaj mi ĉiufoje lernis de li iun punkton kaj mi havas tre bonajn rememoraĵojn pri tiuj rondoj dum kiuj ni ankaŭ ĝuis lian piano-ludadon dum niaj ripozoj.

Li havis/as tre zorgeman vid-punkton kiun mi apenaŭ trovis en aliaj kunlaborantoj miaj dum preskaŭ 20-jara kunlaborado kun diversaj fakuloj. Li neniam ĉesis lerni kaj demandi. Lia valora libraro divers-lingva estas alia indikilo de lia vasta scio kaj lia daŭra emo por lernado. En diversaj okazoj li helpis min trovi mian deziratan temon serĉatan.

Laŭ mia scio li scias almenaŭ kvar aliajn lingvojn krom la persan; t.e.: Esperanton, anglan, germanan kaj turkan. Tia kapablo kune kun libraro lia helpis nin trovi la plej konvenan vorton por la tradukota vorto. Tamen li neniam estis/as kontenta pri la farita laboro kaj deziris aperigi la plej kompletan verkon uzante la spertojn de ĉiuj pasintaj vortar-verkistoj. Li sola jam preparis la Persan-Esperantan version de tiu vortaro, kies publikiĝon ĉiuj atendas. Nazi Solat

kvankam vi estas maljuna laŭ vizaĝe
Sed staturo via monteskas
Starante kontraŭ hipokriteco de l' tempo.
Koro via estas diafana ĉielo
A. Zokai*

Antaŭ 20 jaroj estis la unua foje ke mi vidis lin. S-ro Azari kaj d-ro Pezeŝki (Dentisto, kiu min konatigis kun esperanto) parolis per stranga lingvo!! Post kelkaj monatoj s-ro Azari estis mia bona instruisto por instrui strangan lingvon. Li sen ofertis instruon al sia lernantoj kaj kuraĝigis nin paroli serioze.

Tamen ke li ne estante pli juna sed lia entuziasmo por lerni en diversaj kampoj ege impresis min eĉ hontigis min. Li ĉiam volis lerni kaj scii pli kaj pli senlace; tiu ankaŭ lernigis nin ke ĉiam estas tempo por lerni kaj ni ankaŭ devas fari tiel. Mi admiris/as lian potencon kaj klopodon speciale dum preparado de lia valora libro.

Kiam mi ekis unuajn paŝojn de preparado de lia vortaro por presi, ĉar li havis precizajn kaj diversajn vidpunktojn pri kompostado kaj pro sia pedanteco (skrupeco) eĉ li decidis lerni programon de komputilo (softvaro) por ke li pli precize kaj rapide ĉion enordigu.

Ankaŭ en sporto li ankoraŭ estas aktiva. Speciale en grimpado.

Fariba N.Maĝd

*- A. Zokai, Poem-kolekto de Tavalodi Az Kharestan (Naskiĝo el rubusejo), 3a ed. 1378, (2000) Tehran, Seda eldonejo, P. 17

Rememoroj de afganaj rifuĝintaj infanoj en Irano

Sopirante Revon

Al suno diru
Ne brilu
Al luno, ne lumu
Malantaŭ ĉiu ŝtono
Embuskas pafisto
Al infanoj diru
Al ludo ne venu
Al knabinoj diru
Ĉe la fonton ne alvenu
Malantaŭ ĉiu ŝtono
Embuskas pafisto
Al ĉiuj diru
Afganaj infanoj
Sur teron minoplenan
Metas siajn piedojn
Kaj post ĉia ĝojsalteto
Plu ne havas piedon
Al ĉiuj vi diru

Abdol Rahman Zokai



S-ro Abdol Rahman Zokai* aranĝis kaj publikigis libron en la jaro1997 entenanta skribaĵojn kaj desegnaĵojn de afganaj infanoj rifuĝintaj en Iranon. F-ino M. Fahmi, Esperantigis parton de la libro por niaj legantoj:

Mi aĝis ok jarojn kaj mi memoras la internan militon,en kiu la homoj batalis kontraŭ sia popolo aŭ najbaro kaj fratmortigadis. Tiu ĉi milito trudis plian damaĝon al la popolo, ĉar en milito kontraŭ Sovet-Unio la homoj almenaŭ ne batalis kontraŭ siaj najbaroj kaj fratoj, sed kontraŭ sia malamiko kaj celo estis libereco kaj elpelo de la malamiko. Sed post la venko de la milito, ekflamis la interna milito inter afganoj pri la regado kaj pliiĝis malfacilaĵoj de la popolo senpeka. Tiam mi estis ses-jaraĝa, sed mi bone vidis la suferon de la homoj kaj kelkaj el ili pro la milito kaj sangoverŝado ne kuraĝis eliri el la domoj kaj restis hejme. Mi havas maldolĉan memoraĵon ne forgeseblan. Iun tagon mia patrino vokis min kaj diris: "Fatemeh, iru alporti akvon el la fonto". Mi timante militon ne akceptis iri. La patrino sentante mian animstaton diris: "Ne timu, iru kun Momene (ŝi estis kaj mia amikino kaj najbaro), tagmeze eblus ke la milito ne esti aktiva. Mi ne eviteble iris kun Momene. Kiam ni alvenis ĉe la fonton kaj volis preni akvon, eksonis laŭta kuglo. Ni ambaŭ ektimis kaj haste plenigis niajn kruĉojn kaj rapidis hejmen. Pro la longa distanco multaj kugloj trafis kontraŭ teron ĉirkaŭ ni. Kiam ni alproksimiĝis al la domo, mia patro ade kriis: "Ĵetu la kruĉon". Ĉiakaze ni atingis hejmen kaj patro multe kverelis kun ni kaj disputis kun la patrino. Resume, tiu tago pasis kun mizero, ankaŭ semajnoj, monatoj kaj milito venis al sia fino. Ne nur ni sed ankaŭ la tuta popolo eltenis gravan suferon kaj multaj estis mortintaj. Kelkaj kiel ni devige vagadis kaj rifuĝis al fremdaj landoj. Ni ankaŭ decidis iri al Irano. Antaŭ la foriro mia fratino kun sia filino venis vidi nin kaj restis kelkajn tagojn ĉe ni kaj disiĝtempe ni multe ploris kaj adiaŭis kun ŝi.

En iu tago sunsubirtempe mia pli aĝa frato, kiu jam perdis siajn du infanojn infanaĝe kaj nur havis unu filinon, venis al nia hejmo kaj diris: "Morgaŭ nokte ni ekiros al Irano". Ni por pagi la lukoston de la aŭto vendis niajn vivrimedojn. Nokte kiam ni volis paki la objektojn, la najbaro kaj ŝia filino venis adiaŭi nin. Vere ilia disiĝo ne estis eltenebla por ni.

La postan tagon fininte la preĝon, ni enaŭtiĝis; la aŭto tre malbonodoris. Ni adiaŭis la landon, lando en kiu ja estis nia tuta ekzisto. Dum la vojo ni multe suferis kaj malsaniĝis, aparte la nevino tre malbone fartis kaj mankis d-ro por kuraci ŝin. Tolerinte ĉian mizeron ni alvenis al la limo inter Afganestano kaj Irano. Ĉirkaŭ 40 tagoj ni restis sub tendoj kaj multe suferis. En iu nokto pro la kriziĝo de nevina malsano, la frato devige turnis sin al kuracisto en fora distanco. La d-ro jam donis al li kelke da sekaj seromoj por forigi ŝian soifon. Ni miksante tion kun akvo faris solvaĵon kaj donadis al ŝi, kiam ŝi sentis soifon. Matene kiam ni vekiĝis, ni

ektrovis ŝin mortinta. Ŝia forpaso havis tre malbonan efikon sur la gepatroj kaj malsanigis ilin. Ĉiakaze, la postan tagon ni atingis al Irano kaj komence eniris la sanktan urbon Maŝhado kaj loĝis en gastejo por trovi ejon. La posedanto de gastejo disponigis al ni gas-kuirilon por povi almenaŭ infuzi teon sed neniu el ni povosciis uzi ĝin, do ni redonis ĝin. Mi kaj mia patrino kaj bofratino(edzino de mia frato) tiom malbone fartis, ke ni ne sciis kie ni estas kaj ade naŭzis kaj havis kapdoloron.

Post iom mia patrina onklo informiĝis pri ni kaj venis kaj kunportis nin al sia domo. Ĉirkaŭ 15 tagojn ni restis ĉe ili kaj tiam ni povis trovi domon por lui. Dume ni iom fartis pli bone. Post unu semajno patrina onklo kiun mi ne jam vidis antaŭe, venis el Tehrano kaj kelkajn tagojn restis ĉe ni. Vintro venis al sia fino kaj ni familie iris al brik-farejo kaj okupiĝis tie.

En la venonta jaro mi kaj mia bofratino skribis niajn nomojn en la klaso de Alfabetiga Movado kaj finis la unuan klason (sukcese). Pro la manko de la laboro kaj malalteco de la laborpago, miaj fratoj devige iris al Tehrano. Post unu jaro la patro diris: "Ni devas iri al alia loko". Mi devige forlasis la klason kaj iris al Malajero, urbo en provico Hamadano kaj denove iris al brikfarejo kaj ĉar la vetero estis tre malvarma kaj ade neĝis kaj pluvis, mi kun la patrino kaj miaj fratoj reiris al Tehrano kaj post unu semajno revenis.

Tiun jaron ni tre suferis, ĉar mi kaj mia eta frato devis kolekti ĉiujn brikojn faritajn de miaj patro kaj fratoj. Nefarunte tion oni grave punus nin. Aŭtune, kiam la brikfareja laboro finiĝis, ni denove revenis al Maŝhado, kaj mi iris al la klaso. Kiam mi finis la trian klason kaj komencis la kvaran, miaj tri grandaj fratoj iris labori en Tehrano. Mi kaj miaj gepatroj kaj la bofratino, kiu lastatempe estis naskinta filinon, kaj miaj kvar aliaj fratoj restis tie. Du el miaj fratoj tage teksis tapiŝon kaj nokte iris al la (alfabetiga) klaso. Mi ankaŭ iris al kvara klaso. Mia eta frato estis en unua klaso kaj alia frato estis sesjaraĝa. Unu el miaj fratoj kaj lia edzino por helpi la fratojn iris al Tehrano. Mi estis alkutimiĝinta al ilia filino, kaj la disiĝo multe min ĉagrenis.

Ni estis pretiginta nin doni ekzamenon, kiam mia patro denove decidis iri al Malajero. Mi multe persistis malhelpi aŭ almenaŭ kun mia eta frato resti en la hejmo de la patrina onklo, sed la patro ne akceptis kaj diris: "La laboron de brikfarejo senhelpe oni ne povas fari, ni devas iri kune." Mi kaj mia etfrato estis tre maltrankvilaj forlasi niajn lecionojn. Mi devige disiĝis el la lernejo kaj ĉi-foje kun du familioj de mia patrina onklo ekiris al Malajero. Ĉirkaŭ sep monatojn (t.e.) ĝis la fino de la aŭtuno ni laboris tie kaj poste pro la insisto de miaj fratoj ni ĉiuj iris al Tehrano. Tie ni iris al domo, kiun la fratoj estis luintaj. La domo estis tre malgranda kaj du etaĝojn havis, kun eta korto, en kiu nur oni povis meti kelke da bicikloj uzitaj por ir-revenado al agrikultura laboro. Kelk- monatojn ni restis tie. Poste ni luis alian lokon pli grandan. Post unu jaro mi prenis identigan karton de unu konato en Tehrano kaj komencis iri al lernejo. Du jarojn poste la posedanto de la domo rifuzis nin pro la vendo de la domo. Pro tio ni serĉis alian lokon por vivi komforte. Ni multe suferis kaj aŭdis malbonajn vortojn kaj multe sentis humiliĝon. Speciale oni multe mokis min kaj diris: "Vi venis kaj okupis nian landon!" Tiam mi vere ekdeziris, ke ni ne estus metintaj la piedojn ĉi tien !

Kiam ni translokiĝis, la nova domo estis tre malpura kaj fatraso-plena. Mi kaj la patrino kaj bofratino helpis purigi la domon, sed ĉar la domo estis tre malnova, ne fariĝis pura laŭ-dezire kaj ĉar ni ne kapablis lui la pli bonan, neeviteble akceptis ĝin. Nia kuirejo estis plena de skaraboj kaj gekoj. Ili min multe timigis. Du jaroj ni restis tie kaj mi finis la kvaran klason. Kiam mi volis enskribi mian nomon en la kvina klaso, la instruisto, s-ino Abbasi diris al ni kaj aliaj, kiuj lernis per alies (identigaj) kartoj: "Vi plu ne enskribu vian nomon, ĉar oni eblus veni el ministrejo kaj ekscii, ke vi lernas per falsaj kartoj kaj ili grave vin monpunos. Malgraŭ ŝia averto ni skribis nian nomon kaj finis la jaron sen problemo.

Trovi la domon pli konvenan ne estis facile. Oni postulis kaj luprezon kaj antaŭ-mon(sum)on. Fine ni povis kun mia dua frato, kiu havis du filojn trovi domon duetaĝan kaj prenis hipotekon. La suba etaĝo havis du ĉambron kaj unu kuirejon kaj necesejo estis apud la ĉambro. En la supra etaĝo estis unu kuirejo en kiu estis musoj. Post kelkaj semajnoj la posedanto postulis la luprezon. Mia patro diris : "En la kontrakto ni ne havis luprezon kaj vi ne aludis pri tio en la subskribita interkonsento". Sed la posedanto postulis dekmil tomanojn kaj la patro kontraŭis. La posedanto por la evakuo de la domo, donis limtempon de du tagoj. Ni denove fariĝis vaguloj kaj iris trovi domon. Aliflanke mi volis enskribi mian nomon en la sesa klaso. Ili diris, ke mi estas multaĝa, kaj ni ne akceptas vin kaj vi devas lasi la studadon. Aŭdinte tion mi multe iĝis maltrankvila.

Fine ni trovis alian domon hipotekpreni. Post kelkaj monatoj mi sukcesis daŭrigi la studadon en afgana lernejo kaj sentis min tre gaja studi sen nenies bonfaro, kvankam nenie estas kiel mia lando kaj ties lernejoj.

Fateme Mohammadi – la lenantion

**Presisto, eldonisto kaj poeto naskita en jaro1953.*

La Rolo de La Internaciaj Organizoj en Afganio

Mohsen Maĥmalbaf

Tradukis: (f-ino) Simin Emrani


Mohsen Maĥmalbaf, renoma reĝisoro irana, verkis longan artikolon (pli ol 50 paĝojn) en la jaro 2001 titolita: "En Afganio Budho ne Detruiĝis, ĝi Disfalis de Honto". Ĝi jam tradukiĝis en dekojn da lingvoj. Kelkaj fragmentoj de la artikolo aperas ĉi-sube en nia lingvo. Pri biografio kaj kariero de Maĥmalbaf kaj teksto de unu el liaj famaj intervjuoj, vidu: n-ron 3 de Irana Esperantisto, printempo 2003, p. 3-5.

Estas dirite ke en Afganio aktivas 180 internaciaj organizoj. En Harat-urbo mi ju pli serĉis des malpli trovis. Mi iris al "La Ruĝa Kruco" sed, ili evitis respondi eĉ al miaj ne-politikaj demandoj. Finfine mi konstatis ke ilia rolo inkluzivas kelkajn aferojn:

1-Disdoni panon inter la agoniantaj malsatuloj.
2-Klopodi por libergi aŭ interŝanĝi la nordajn aŭ sudajn malliberuloj.
3-Elfari artefaritajn piedojn kaj manojn por la surmin-irintoj.

Sed krom la eta rolo de la internaciaj organizoj, la gejunuloj kiuj tiele venis (kaj aktivas), tre ravas min. Mi renkontiĝas kun angla dek naŭ-jara fraŭlino kiu elfaras artefaritajn manojn kaj piedojn. Mi demandas ŝin kial en tia junaĝo kiam ŝi devus vivi en la komforta eŭropo, ŝi venis al tiu ĉi malsekura lando en kiu ŝi eĉ ne povas promeni surstrate? Ŝi respondas: "La situacio iomete diferencas por mi. En Afganio kie la virinoj estas sub Bargao[1], mi laboras sen kaptuko en la oficejo kaj laborĉambro. **Sed responde al tio ke kial mi jam venis al Afganio, mi diras: ĉar tie ĉi mi estas utila kaj ĉiutage faras manojn kaj piedojn por la homoj, sed en Anglio ne ekzistas laboro kiu povus kontentigi min. Ekde kiam mi venis, kelkcent homoj (per piedoj kiujn mi faris) jam povas vojiri."**

Mi sentas ke la rolo de internaciaj organizoj estas ŝmiri iomete da ungvento sur profundajn kaj vastajn vundojn de afgana nacio, kaj nenio plu. D-ro Kamal Hosejn, la reprezentanto de UN jam hontas plu telefoni al mi, ĉar li ne povis eĉ preni vizon de Pakistano por mi. Mi rememoras lin kiam venis al mia oficejo kaj deziris kunlabori kiel vicreĝisoro ĉar li jam sentis vanecon pri sia



laboro. Kaj ankaŭ mi, kiu jam finis la film-faradon de ***"Vojaĝo al Kandeharo"***[2], same atingis al absurdo pri mia profesio. **Mi ne povas kredi ke la profundan oceanon de homara nesciado bruligos la flameto de iu raporto aŭ filmo. Kaj mi ne povas ekkredi ke iu 19jara angla fraŭlino povu savi landon kies popolo dum venontaj 50 jaroj devos perdi siajn manojn kaj piedojn pro senplane instalitaj minoj**. Do kial ŝi iras al Afganio? Kaj kial d-ro Kamal Hosejn malgraŭ sia senesperiĝo ankoraŭ raportas al UN? Kaj, pro kio mi faris tiun filmon? Aŭ kial mi skribas tiujn ĉi notojn? Mi ne scias, sed kiel Paskalo[3] diras, **la koro havas argumentojn, pri kiuj la racio nenion scias**.

NOTOJ:

1- Longa kaptuko por virinoj kovranta ankaŭ la vizaĝon kun malgranda punta parto antaŭ okuloj, tra kiu oni povas vidi.
2- El gravaj urboj de Afganio
3- Franca verkisto kaj filozofo/ 17a jarcento pK

FONTO:

MAĤMALBAF, Mohsen. *Didan va Nadidan* (Vidi kaj ne Vidi), Tehrano: Nej-eldonejo, 2002, 408 p., p. 273-331

Afgana virino, La plej mallibera virino en la mondo

Mohsen Maĥmalbaf Tradukis: (s-ino)Fariba N.Maĝd

Afgana socio estas patriarka socio. Oni eĉ povas pretendi ke la rajtoj de 10 milionoj de afganaj virinoj, kiuj konsistigas duonon da afgana socio, estas malpli ol tiuj de la plej malforta nekonata afgana gento. Rilate al la afgana partiarkio, neniun genton oni povas ekskluzivi.

La fakto ke Afgana virino, eĉ laŭ vidpunkto de Taĝikoj, ne rajtas partopreni en elektadoj, estas la plej malmulta parolo kiun oni povas aŭdi pri afganaj virinoj.



Post ekapero de Talebanoj, knabinaj lernejoj fermiĝis kaj ĝis longa tempo oni malpermesis la ĉeeston de la virinoj sur stratoj. Pli ĉagrena afero estas tio ke eĉ antaŭ Talebanoj, el ĉiu dudeko da afganaj virinoj, unu persono kapablis legi kaj skribi. Ĉi tiu statistiko montras ke afgana kulturo estis malebliginta frekventadon de 95 procentojn da virinoj al la lernejoj, kaj Talebanoj malebligis la restitan 5 procentojn. Do kial oni ne demandu pli realiste ke: "Ĉu afgana kulturo estas efiko de Talebanoj aŭ kaŭzo de ĝi?"

Mi kiam estis en Afganio, sur stratoj vidis virinojn sub Borgao[1], frekventantaj, butikumantaj kaj almozpetantaj, kompreneble ĉe butikoj kiuj vendis eluzitajn varojn. Tio, kio kaptis mian atenton, estis virinoj sub borgaoj sidantaj ĉe kolportvendistaj knaboj, kiuj lakis iliajn ungojn. Por longa tempo mi estis pensanta kial ili ne aĉetas lakon por uzi ĝin hejme? Poste mi komprenis la kialon: ĉar tio estis pli ekonomia: aĉeti lakon estas pli multkoste ol uzi ĝin por unu fojo. Mi diris al mi mem tio estas bona signo ke mallibera virino sub borgao ankoraŭ deziras vivi kaj beliĝi, kaj malgraŭ la malriĉeco ŝi ankoraŭ tiom pensas pri sia beleco. Sed pli poste mi rezultis, oni ne rajtas malliberigi virinojn en iu socio, medio, aŭ tradicia vesto kaj poste esti kontentaj ke "Ŝi ankoraŭ pensas pri sia beleco!" Tio, nur montras tion ke malgraŭ tiu ĉi malleberejo, afgana virino devas restigi sin akceptebla por sia edzo por ke ne estu tute forlasita (flanke de la edzo) kompare kun aliaj virinoj, kiuj estas ŝiaj havuoj[2].

Poligamio, kiun praktikas ankaŭ la pli junaj afganaj viroj, transformis domojn de multaj afganaj familioj al haremoj. Malgraŭ tio ke edziĝo bezonas pagi multan monon kvazaŭ oni volas aĉeti la virinon, tamen mi mem dum filmado vidis maljunulojn kiuj edzinigis sian 10-jaraĝan filinon al alia viro, kaj per la akirita mono, ili mem enpensiĝis edzinigi al si alian 10jaran knabinon. Kvazaŭ eta kapitalo iras de ies mano al alies mano por translokigi knabinojn de ĉi tiu domo al alia domo . Pro tio, la nombro de virinoj kies edzoj estas pli aĝaj ol ili mem, por 30 ĝis 50 jaroj, ne malaltas. Ofte ĉi tiuj edzinoj vivas en sama domo kaj eĉ en sama ĉambro unu apud la aliaj kaj ili ne nur cedas sed alkutimiĝas al la afero.

De Afganio kaj Pakistano mi kunportis multajn vestojn kaj borgaojn por filmado, multaj virinoj kiuj finfine kaj tre malfacile akceptis aperi en la filmo kiel amas-aktorinoj, anstataŭ la salajro volis ekposedi la borgaon. Unu el ili volis ĝin por geedziĝfesto de sia filino. Sed ĉar mi timis ke ankaŭ en Irano borgao fariĝu populara, al neniu mi donacis ĝin.

Unu-foje kiam mi iris al afganaj virinoj por ke ili ludu rolon en mia filmo, iliaj viroj protestis kaj diris: "Ĉu ni estas tiom senpudoraj ke ni ekspoziciu niajn virinojn". Mi diris: "Via virino estos sub borgao kiam ni filmos ŝin". Sed li respondis: "Do spektantoj povas imagi ke sub la borgao estas virino kaj tio estas sen-pudoraĵo". Kelkfoje mi demandis min mem: "Ĉu Talebanoj alportis borgaon aŭ borgao alportis Talebanojn? Ĉu politiko estas efika en ŝanĝado de kulturo aŭ kulturo efikas la politiksistemon?"

En Niatek kampadejo (rifuĝejo), situanta en Irano, afganaj migrintoj mem fermis publikan banujon por viroj kaj virinoj, argumentante ke eble kiam iu pasas preter la muroj de la banujo, sciante ke alia sekso estas nuda malantaŭ la muro, en-pekiĝu.

Nun-tempe en Afganio ne ekzistas kuarcistino, kaj se iu malsana virino volas diri sian problemon al kuracisto, ŝi devas iri al la kuracisto kun sia proksima parenco, ekz-e la filo, edzo aŭ frato por ke li diru ŝian doloron aŭ problemon al la kuracisto.

Ankaŭ ĉe geedziĝoj, anstataŭ la novedzino, ŝia patro aŭ frato devas diri la "Jeson".

NOTOJ:

1- Vizaĝkovrilo, kiun surmetas virinoj.

2- Ĉiu edzino de sama edzo nomiĝas havuo de la alia(j)edzino (j). Do eble " samedzulino" taŭgus por " havuo".

FONTO:

MAĤMALBAF, Mohsen. *Didan va Nadidan* (Vidi kaj ne Vidi), Tehrano: Nej-eldonejo, 2002, 408 p., p. 273-331.

Soci-ekonomia Partoprenado de Virinoj

(d-ino) Ŝirin Ahmad-Nia

La seksa malegaleco estas universala fenomeno kaj Irano ne estas escepto tiurilate. En la mondo, nur kvin percentoj da pozicioj kiel politikaj estroj kaj ĉef-direktoroj de ekonomiaj instancoj kaj grand-kompanioj kaj altaj postenoj ĉe internaciaj organizaĵoj apartenas al virinoj, dum fakte virinoj grandnombre laboras en diversaj ŝtataj organizaĵoj, administraj oficejoj kaj fabrikoj ĉefe okupiĝante en malalt-nivelaj kaj malalt-salajraj postenoj (Karl, 1995).

Nuntempe multaj homoj tra la tuta mondo emfazas pri la neceso de la virina partoprenado en diversaj aspektoj de soci-politika vivo de la socioj. Precipe, kiam oni parolas pri soci-politika kaj ekonomia evoluado mondskala, oni rekonas la gravan rolon de virinoj kiel la duono de la homaro sen kies helpo, la dezirata evoluado ne povus efektiviĝi.

Multaj opinias ke sen egala partoprenado de viroj kaj virinoj en ĉiuj aspektoj de la vivo kaj decidado-proceduro, neniam oni atingos al la reala demokratio. Partoprenado de virinoj povas okazi en diversaj formoj ekzemple en la formo de partoprenado en la nivelo de la familia vivo, samkiel en ekonomiaj, soci-kulturaj kaj ankaŭ politikaj formoj. Ju pli multe virinoj partoprenas en la sceno de ekonomia aktivado de iu nacio, des pli alte taksiĝas la nivelo de la soci-ekonomia evoluado de tiu nacio, ĉar lastatempe la procento de virinoj en la labor-merkato estas konsiderata kiel unu el la indikiloj de tia evoluado. Estas menciinde ke pli antaŭe oni gravigis la kvantajn aspektojn de virina aktiva partoprenado, tamen nuntempe oni ankaŭ pri-



Atenton! Virinoj laboras

atentas la kvalitan aspekton de ties partoprenado. Tio estas, oni pri-atentas ne nur al la nombro de envolvitaj virinoj, sed ankaŭ al tio ke ĉu ili partoprenas en decidaj aferoj aŭ ne. Fakte ekzistas reciproka rilato inter kvantaj kaj kvalitaj aspektoj de la partoprenado kaj oni juĝas la kvalitan eĉ pli grava (sama fonto).

Malgraŭ la senduba graveco de aktivado de virinoj soci-nivela, ankoraŭ estas sennombraj malhelpoj sur la vojo al tiu celo. Precipe kulturaj baroj sin altrudas al la efektiviĝo de la idealo. Tiaj baroj sin montras en la simplaj formoj, ekzemple la malhelpo kaj malakceptado de edzoj pri la laborado de iliaj edzinoj ekster-hejme. Ali-ekzemple ankaŭ iuj direktoroj de laborejoj kaj kompanioj malkonsentas enlaborigi virinojn preferante dungi virojn. En Irano, momente, la kiomo de virina senlaboreco estas relative duobla kompare al tiu de la viroj eĉ nun kiam

la nombro de alte-edukitaj virinoj jam tiel grande kreskis. La figuroj 1 kaj 2 kaj la ciferoj en la tabulo 1 prezentas faktojn pri la situacio de iranaj virinoj kaj klarigas iujn terenojn kie la malegaleco kun la viroj pli rimarkeblas.

Por kontraŭstari la problemojn sur la vojo de virina vasta soci-politika partoprenado, oni lastatempe emfazas sur strategioj kiel-ekzemple la "kapabligado" de virinoj. Tio, iu-difine signifas re-distribuadon de homa laborforto (Karl, 1995). Ali-vorte tio signifas komunan agadon por pli-altigi la soci-politikan konsciadon de virinoj kio baziĝas sur la memstariĝo kaj sin-kontrolado de ili. Tio celas ke virinoj povu pli efektive gvidi siajn proprajn vivojn, ne necese alies vivojn. Tiel ke ili povu atingi la kapablon interagi kun aliuloj ĉirkaŭ si por ke la favorataj ŝanĝoj efektiviĝu. La rezulto de tia "kapabligado" estos do akirado de pli da potenco, pli da memfido, kaj pli da kontrolo pri propraj enspezoj por virinoj. Tiu celo konsideriĝas ankaŭ kiel unu el la postulaĵoj de novaj naciaj evoluado-planoj.


Tiun strategion ankaŭ forte subtenas kaj sekvas la tiel nomataj "ne-registaraj organizoj" de virinoj, kiuj lastatempe tiel grande kreskis en nombro ankaŭ en Irano (Markaze Omure Mosharekate Zanan, 2001). Ili sekvas tion pere de informado, kapaciigado, kaj organizado de virinoj nacie kaj internacie. Tiel oni deziras aliigi la ne-egalan staton inter viroj kun virinoj, pliigi la decido-povon de virinoj hejme kaj soci-nivele, kaj atingi pli grandan soci-politikan partoprenadon de virinoj mondskale.

Tabelo 1: Socio-ekonomiaj indikiloj pri seks-malegaleco en Irano


Indikiloj (%)	1988	1995	1997
Virina ekonomia aktivado kompare al viroj	11.6	13.9	14.3
Virinoj en ŝtataj postenoj	29.7	29.2	29.1
Alfabetaj virinoj	46.3	63.8	67.0*
Alfabetaj viroj	67.1	78.5	81.9
Akirita enspezo de virinoj	7.6	9.1	9.7
Akirita enspezo de viroj	92.4	90.9	90.3
Virinoj en parlamento	2	3.3	5.2
Viroj en parlamento	98	96.7	94.8

Lau la ĉi-jaraj statistikoj tiu percento jam atingis 80.

Figuro 1: Elcenta distribuo de virinoj laŭ aktivado-statpo en Irano: 1996 (fonto: ISC, 2000, p. 142)



Figuro 2: Elcenta distribuo de alfabetaj virinoj laŭ studnivelo en Irano: 1986 kaj 1996 (fonto: ISC, 2000, p.55)



FONTOJ:

-Irana Statistika Centro (ISC), Viĵegihaje Eĝtemai-Egtesadije Zanan dar Iran (Soci-ekonomiaj karakterizaĵoj de virinoj en Irano), Tehrano: Irana Statistika Centro, 2000, 300 p.

-KARL, Marilee. Women and Empowerment, Participation and decision making (Virinoj kaj Kapabligado, Partoprenado kaj Decidado), London & New Jersey: Zed Books Ltd, 1995, 173 p.

-Human Development Report of the Islamic Republic of Iran, 1999 (Raporto pri homa evoluado en Islama Republiko de Irano, 1999, Tehrano: Plan and Budget Organization & UN.

- Markaze Omure Mosharekate Zanan (Irana Centro pri virina partoprenado), Moŝarekate zanan va doŭlate haftom 1999-2002 (Virina Partoprenado kaj la Sepa ŝtato 1999-2002), Tehrano: Markaze Omure Mosharekate Zanan, 2001, 178p.

Rido kun la Granduloj

Rido kun la Granduloj estas titolo de perslingva libro entenanta mallongajn kaj dolĉajn rakontojn elektitaj el diversaj famaj verkoj de la persa literaturo kaj mistikismo. Jen traduko de kelkaj rakontoj kun la cito de la font-verko kaj ties verkisto:

La Soleco de Ŝahid Balĥi

Iu-tage Ŝahid Balĥi sidis kaj legis libron. Iu malklerulo proksimiĝis al li, salutis lin kaj diris: "Sinjora moŝto! Vi sidas sola!"




Ŝahid diris: "Nun, kiam vi alvenis, mi soliĝis ĉar via alveno jam detenis min de studado."

Citita el: *Ĝavame-ol-Hekajat* (Rakontujo), far Mohammad Oŭfi (12a jc.)

Taŭga respondo

Iun tagon Mir-Ali Ŝah alvokis al Moŭlana Banai. Kiam Moŭlana Banai troviĝis de malproksime, Mir-Ali Ŝah iel rigardis al li, kvazaŭ li ne konis lin. Kiam li proksimiĝis, Mir-Ali ŝah diris: "Banai! Tio estis vi? Kiam vi troviĝis de malproksime, mi imagis ke iu azeno venas."



Banai diris: "Ankaŭ kiam mi vidis vin de for, mi imagis ke iu homo sidas tie."

Citita el: *Badaje-ol-vagaje* (Novaj kaj Strangaj Okazaĵoj), far Zejn-od-Din Mahmud Vasefi (16a jc.)

La Frenezuloj de Basreo

Iam Bohlul Bagdadi estis en Basre-urbo. Oni diris al li: "Nombru la frenezulojn de Basreo!" Li diris "Tio estus sennombra, sed se vi diru ke mi nombru la saĝulojn, (tio eblus ĉar) ili estas tre malmultaj."

Citita el: *Latajef-o-Tavajef* (Ŝercaĵoj de Gentoj), far Moŭlana Faĥr-ed-Din Ali Safi (16a jc.)

Bona preĝo por Haĝĝaĝ

Iam en Bagdado ekaperis dervîŝo kies petoj tra la preĝoj ĉiam akceptiĝis flanke de dio. Oni sciigis tion al Haĝĝaĝ Jusef.



Li alvokis la dervîŝon kaj diris: "Preĝpetu ion bonan por mi".

La dervîŝo diris: "Ho dio! forprenu lian animon!"

Haĝĝaĝ diris: "Pro la Dio, kia estas tiu ĉi preĝo"?

La dervîŝo diris: "Tio estas bona preĝo por vi kaj por la tuta islamanaro."

Citita el: *Golestan* (Florejo), far Mosleh-od-Din Sadio (14a jc.)

Haĝo de Bajazid

Oni rakontas ke Bajazid Bastami diris: "Iu viro survoje venis ĉe min kaj diris: "kien vi iras?"

Mi diris: "Al (Mekko por) Haĝo." (Haĝo estas necesa pilgrimado por ĉiu islamano, kiu povas pagi la bezonatajn kostojn. I.a. la pilgrimanto devas rondiri ĉirkaŭ Kaabo, t.e. di-domo, sep fojojn.)

Li diris: "Kion vi havas?"

Mi diris: "Ducent derhamojn." (tiea monunuo)

Li diris: "Bonvole donu al mi vian monon kaj sepfoje rondiru ĉiekaŭ mi; via haĝo estas tio ĉi, ĉar mi (estas malriĉa kaj) havas edzinon kaj infanojn."

Bastami diras: "Mi tiel faris kaj revenis."

Citita el: *Tazkerat-ol-Oŭlija* (Biografioj de Kunuloj), far Farid-od-Din Attar (13a jc.)

Tradukis: (s-ino) **Behĝat Mamduhi**


FONTO:

BARABADI, Mahmud (kompil). *Labĥand ba Bozorgan* (Rido kun la Granduloj), Bildoj far Ehsan Barabadi, Tehrano: Naŝr Tarh va Eĝraje Ketab, 2000, 96 p.

Ŝejko Abol-Hasan Ĥaragani, Altruista Mistikulo

Ahmad Reza Mamduhi

"Al ĉiu kiu envenas en tiun ĉi domon, donu panon kaj ne demandu lin pri lia kredo, ĉar tiu kiu valoras je vivo ĉe la trono de la dio, certe valoras je pano ĉe la manĝotuko de Abol-Hasan."



Tion li estis skribinta super la enirejo de sia ĥangaho (koleltiĝejo de sufioj, dervîŝoj kaj ŝejkoj)*

Ŝejko Abol-Hasan Ali-ebne Ĝafar-ebne Salman de Ĥaragano, konata je Abol-Hasan Ĥaragani (962-1033) estas unu el la renomaj mistikuloj de Irano kiun pleje karakterizas altruismo, asketismo kaj toleremo. Li i.a. estis samtempa kun alia tre fama mistikulo ŝejko Abu-Said Abol-Ĥejr (967-1049) [vidu: Irana Esperantisto, n-ro 6, vintro 2004, p. 21-25] kaj Abu Ali-ebne Sina, granda filozofo kaj medicinisto irana, okcidente konata je Aviceno (980-1037) kaj Naser-Ĥosro Gobadijani (1003-1088) renoma poeto, verkisto kaj esploristo de Irano. Ĉiuj ili vojaĝis al Ĥaragan-vilaĝo por viziti al Ĥaragani. Tio per si mem montras la grandecon de la mistikulo. Li naskiĝis kaj forpasis en Ĥaragano, vilaĝo proksima al Bastam-urbo en tiama Ĥorasano kaj nuna Semnan-provinco de Irano.

Majstroj de Ĥaragani

Konata estas lia diraĵo ke li neniam havis majstron homan:

Kaj li diris: "Min mirigas tiuj ĉi lernantoj, kiuj diras 'Ni iris ĉe la majstron' sed vi scias ke mi neniun prenis kiel majstron, ĉar mia majstro estis la dio, la benata kaj la supera, kaj mi estimas ĉiujn maljunulojn (majstrojn). [269]

Tamen li amegis pri Bajazid Bastami (m. 874), titolita kiel *soltan-ol-arefin* (la sultano de mistikuloj) kiun li neniam povus viziti fizike, ĉar kiam Ĥaragani naskiĝis, jam pasis ĉ. jarcento de Bajazida forpaso. Distanco inter Bastam-urbo kaj Ĥaragan-vilaĝo estas ĉ. 5 km, kaj Ĥaragani multfoje piede iris la vojon por atingi la tombon de Bajazid inspiriĝonte kaj trovonte respondojn al siaj demandoj.

Sian amon al Bajazid, li esprimis en multaj okazoj kaj diraĵoj, ekz-e:

Iutage li demandis lernanton: "Kio estus pli bone?" La disĉiplo diris: "Ne scias mi". Li diris: "La mondo plenus de viroj, ĉiuj kiel Bajazid". [464]

Por montri kiom multe Ĥaragani sekvemis Bajazidon pensmaniere, ni atentu al jenaj paroloj de ili du; kvazaŭ Ĥaragani estis plenumanta Bajazidajn postulojn. Barazid estis dirinta:

"Mia disĉiplo estas tiu kiu staru ĉe enirejo de la infero kaj prenu la manon de ĉiu kiun oni volas alporti en la inferon kaj sendu lin al la paradizo kaj mem iru en la inferon anstataŭ li."

Kaj Ĥaragani kvazaŭ responde al Bajazid diris:

Estus dezirinde se anstataŭ ĉiuj popolanoj, mi mortus por ke la popoloj ne deviĝus morti …

Estus dezirinde se anstataŭ ĉiuj popolanoj, mi puniĝus por ke ili ne deviĝus ekvidi la inferon …

Liaj Diraĵoj
Ĥaragani kiel Abu-Said ne tiel emis skribi pri siaj spertoj kaj trovitaĵoj. Tamen, denove samkiel okazis pri Abu-Said, aliaj inklinis kaj faris tion, t.e. surpaperigis liajn diraĵojn kaj/aŭ rakontojn pri li. La plej ampleksa kaj fama verko tia, titolas *Nur-ol-Olum* (Lumo de sciencoj) skribita far unu el liaj disĉiploj. La verkon redaktis kaj publikigis Moĝtaba Minovi, nuntempa irana esploristo, kune kun fragmentoj de aŭ pri Ĥaragani el aliaj literaturaj verkoj, plejparte el fama verko de ŝejko Farid-od-din Attar (1119-1229?), mem giganta mistikulo kaj poeto de Irano. La verk-titolo de Attar estas *Tazkerat-ol-Oŭlija* (Biografioj de Kunuloj) kaj ĝi servas bonege kiel klasika "Kiu estas kiu en mistikismo". Aliaj verkoj, el kiuj Minovi citis pri-Ĥaraganiajn skribaĵojn estas kiel: *Asrar-ot-Toŭhid* (La Sekretoj de l' Unueco), kompilita far Mohammad-ebne Monavvar inter 1179 kaj 1192, pri lia avo Abu-Said Abol-Ĥejr (967-1049), *Masnavije Manavi* (Spirituala Masnavio) far Rumi (1207-1273) [bv. vd. Irana Esperantisto, aŭtuno 2003, N-ro 5, Jaro 2, pp. 4-7], *Nafahat-ol-Ons* (Amikecaj Blovetoj) far Abd-or-Rahman Ĝami (1414-1492), persa poeto kaj mistikulo, kaj *Kaŝf-ol-Mahĝub* (Malkovro de Kovrito) far Abol-Hasan Hoĝviri. Plejmulto de diraĵoj de Ĥaragani cititaj en tiu ĉi artikolo elekiĝis el la valora kolektaĵo de Minovi. Tiajn citaĵojn distingigas numeroj en krampoj, kiuj montras paragraf-numeron en la verko.

Granda Altruisto
Unu el ĉefaj trajtoj de Ĥaragani eble estas abnegacio aŭ altruismo. Al ĉiu verko kiu enhavas liajn diraĵojn kaj/aŭ rakontojn pri li, neniel mankas divers-nuancaj materialoj montrantaj pri lia funda altruismo. Tio vere gravas ke kvankam li mem apartenis al la asketece suferemaj aŭ sinsuferigaj mistikuloj, li ĉiam angoris pri aliaj kaj deziris ke ili ne ensuferiĝu. Por plenumo de tia deziro, li tutpretis sinoferi, kiel ekz-oj:
Kaj li diris: "Matene kiam vekiĝas scienculo, li serĉas pri plua scienco; kaj la piulo serĉas pri plua pieco; kaj Abol-Hasan pripensegas atingigi gajon al la koro de frato. [159]
Kaj li diris: "Se de Turkujo ĝis Ŝamo ies fingron pikas dorno, tiu (fingro) estas mia; kaj ankaŭ se de Turkujo ĝis Ŝamo ies piedo ekfrapiĝas kontraŭ ŝtono, ties doloro estas mia; kaj se ĉagreno estas en koro, tiu koro estas mia." [86]
Kaj li diris: " Ho dio! Sendu vian mort-anĝelon por ke li forprenu mian vivon kaj mi forprenu lian vivon tiel ke oni forportu la kadavrojn de ambaŭ ni al la tombejo (kaj nenies alian vivon la anĝelo forprenivu)." [222]

Celante altruismon, li eĉ anoncis sian volon al la dio pereigi la paradizon kaj la inferon:
Kaj li diris (al la dio): "Mi neniigos la paradizon por vidi kien vi alportus paradizulojn, kaj mi neniigos la inferon, por vidi kien vi alportus la inferulojn." [130]
Ĉar li kredis ke nur tiel oni distingos verajn kredantojn:
Li diris: "Ho dio! Kio okazus se la infero kaj patradizo ne ekzistus por ke evidentiĝu kiu (vere) estas di-adorema." [144]
Li diris: "Mi tiel enpacas kun popolo ke neniam militis (kontraŭ ili) kaj kun mia memo (nafs) mi tiel militis ke neniam repaciĝis (kun ĝi)". [161]

Toleremo
Vastaj kaj malfermitaj pensmaniero kaj menso de mistikuloj estigas grandan toleremon ĉe ili ĝenerale, tamen rilate al Ĥaragani, tiu ĉi eco, malgraŭ asketeca vivmaniero de li mem, estas eĉ pli konsiderinda. Li, elektinte tre malfacilan kaj suferoplenan vojon al dezirato, ne malpravigas alies vojojn. Fakte, lia-krede laŭ-nombre de unuopaj homoj povas ekzisti ĝustaj vojoj al la celo:
Kaj li diris: "Oni ne povas nombri la vojojn al la dio. Kiom ekzistas homoj, tiom estas vojoj al la dio; sur ĉiu vojo, kiun mi iris, mi vidis homgrupon..." [151]

Amikeco
Amo kaj amikeco esas unu el la ĉefaj esencoj de mistikismo, kaj tia amo ampleksas ĉion kaj ĉiun. Fama poemo de Sadio (1184-1281) bonege montras la amplekson: "Mi amas la tutan mondon, ĉar tut-mondo estas Lia". Nun ni vidu kiel Ĥaragani esprimis sin ĉi-terene:
Kaj li diris: "Se amiko renkontas amikon, li vidas (gravigas) nur la amikon, ne vidas sin."
Certe por pure ami, oni devas forpeli la malon. Ĥaragani sekve de sia amego, ne povas imagi pli malbonan kaj pli malfacilan aferon ol malamado:
Kaj li diris: " En la mondo ne ekzistas pli malfacila afero ol tio ke vi malamu iun."

Scienc-rango ĉe la Mistikulo
Kvankam mistikuloj ĝenerale pli gravigas pri intuicioj, inspiroj kaj supernatureskaj fenomenoj kiel *karamat* (miraklaĵo) kaj

farasat (mens-legado), tamen Ĥaragani altestimis ankaŭ la natursciencojn, kaj kiel dirite, por ekz-o, li estimoplene sintenis ĉe Aviceno – plejeble tre alta simbolo de (natur) sciencoj ne nur tiutempa – kiam li vojaĝis al Ĥaragano por viziti Ĥaraganion. Jen du dirаĵoj de Ĥaraganio montrantaj lian fundan kredon al scienco kaj scienculoj:

Kaj li diris: "Se scienculoj diras 'mi', vi estu 'duon-mi', kaj se (ili estas) 'duon-mi', vi estu 'kvaron-mi'". [351] (En la persa originalo ekzistas ambiguo: la persa vorto por "mi" signifas ankaŭ malnovan pez-unuon egalan al proksimume 3 kg.)

Iam li diris al persono: "Kien vi iras?" Tiu diris: "Al Heĝazo (urbo en nuna Saud-Arabio kiu entenas ankaŭ urbon Mekko, kies pilgrimo t.e. haĝo, necesas por ĉiu islamano, kiu pagivas ties kostojn.)". Li diris: "Kion vi faros tie?" Tiu diris: "Mi serĉos la dion" li diris: "Kie estas la dio de Ĥorasano, ke oni devas iri al Heĝazo? Lia profeta moŝto, la paco estu super li, diris ke serĉu la sciencon eĉ se (por tion fari) vi devas iri ĝis Ĉinujo, (sed) li ne diris ke serĉu la dion". [367]

Renkontiĝo kun Abu-Said Abol-Ĥejr

Foje, kiam Abu-Said kune kun la edzino kaj la filo Abu-Taher, eliris sian loĝlokon pilgrimonte al Mekko (haĝo), survoje iris al Ĥaragano por viziti la ŝejkon. Estas dirite ke dum sia 3-taga restado ĉe Abol-Hasan, Abu-Said estimegante lin ne parolis ĉe li, dirinte ke li venis por aŭskultado.

Ĥaragani i.a., pri la pilgrimado, diris al li:

"Ho ŝejko, ni vidas ke ĉiu-nokte la kaabo rond-iras ĉirkaŭ via kapo, por kiu laboro vi iras al la kaabo, reiru, ĉar oni irigis vin por viziti nin, nun vi jam faris haĝon…Vi estas amato de la mond(anar)o". Ŝejko Abu-Said diris: "Ni iros al Bastamo (kie sin trovas tombo de Bajazid Bastami) por pilgrimado kaj revenos." [16]

La supran rakonton krom en *Asrar-ot-Toŭhid*, oni trovas kaj en *Kaŝf-ol-Mahĝub* (tradukita anglen far profesoro R.A. Nicholson (1868-1945), elp. Nikolson, p.(163) kaj en *Nur-ol-Olum*.

La Edzino ne Kredis je Li

Ĥaragani sendube apartenas al klerularo, kies edzinoj ne kredis je ili. Kiam Aviceno iris al Ĥaragan-vilaĝo por viziti lin, la edzino malferminte la dompordon, komencis malbondiri pri la edzo, kiu momente estis for por kolektado de brullignoj. Ŝejko Farid-od-Din Attar (1119-1229?), giganta mistikulo kaj poeto de Irano, en sia fama verko *Tazkerat-ol-Oŭlija* (Biografioj de Kunuloj), rakontas pri la vizito de Aviceno al Ĥaragani kaj la malbona sinteno de la edzino kontraŭ sia edzo. Ankaŭ Rumi (1207-1273) detale, per pli ol 100 verslinioj, bele rakontas la okazaĵon en la sesa kajero de unu el siaj ĉefverkoj, nomata Spirituala Masnavio (versoj 2044-2152): kiam Aviceno atingis al Ĥaragani, vidis ke leono portas la kolektitajn brullignojn por li. Post iom da interparolo, i.a. Ĥaragani diris: "Se mi ne tolerus tian vulpon (la edzinon), tia ĉi leono ne tolerus mian ŝarĝon!"


Patrino ĉe Ĥaragani

Ne multon oni skribis pri la gepatroj de Ĥaragani, tamen tra skribitaj diraĵoj kaj rakontoj oni povas bone kompreni ke li estis tiel valoriganta ilin kaj laŭ li ĉio kion oni faras por siaj gepatroj ne estas sufiĉa por rekompenci iliajn amojn, angorojn kaj zorgojn:

Estas citite ke la ŝejko diris: "Iam du fratoj vivis kun la patrino. Ĉiu-nokte iu frato okupiĝis servi al la patrino kaj la alia okupiĝis servi al la dio. Tiu persono kiu (ĉiam) okupiĝis pri servo al la dio, estis gaja pro la di-servado, (kaj iam) diris al la frato: "Ankaŭ ĉi-nokte bonvole lasu min servi al la dio." Tiu-nokte dum di-servado (kiam li) terenkuŝiĝis, li endormiĝis, (kaj) aŭdis vokon ke: "Ni jam pardonis vian fraton, kaj vin pardonis pro li". Li diris: "Tio estis mi, kiu okupiĝis pri di-servado, kaj li servis pri la patrino, (kaj nun) vi pardonas min pro li?" La voĉo diris: "Ĉar ni ne bezonas al tio kion vi faras sed via patrino neniel ne bezonas la servadon de via frato." [46]



Tombejo kaj statuo de Ĥaragani en Ĥaragan - Ŝahrud



Interparolo de ŝejko Abol-Hasan Ĥaragani

(citita de Minovi 1988 [664] el kolektaĵo en biblioteko Hanif Afandi en Solejmanijeo en Istanbulo/Turkio, n-ro 452)

Iun nokton post adorado kaj preĝoj al la Dio, la pura kaj la supera, ŝejko Abol-Hasan Ĥaragani ekparolis al dio pri siaj sekretoj kaj bezonoj kaj diris:
"Ho Dio! Morgaŭ ĉe la reviviĝa tago (resurekto), tiam kiam oni enmanigos al ĉiu, leteron pri ties agoj kaj montros al ĉiu el ili, iliajn faritaĵojn, kiam estos mia vico kaj mi trovos okazon, mi scias kian saĝan respondon eldiri."
Ĵus tiam, sekrete voko venis al li ke: "Ho Abol-Hasan, tion kion vi volas diri ĉe la kolektiĝa tago (resurekto), eldiru ĉi-tempe!", Li diris:
"Ho Dio! Kiam vi kreis min en la utero de la patrino, vi kuŝigis min en la mallumo de neiveco, kaj kiam vi estigis min, vi kunigis kun mi malsatan stomakon, tiel ke kiam mi ekestiĝis, mi ploris pro malsato, kaj kiam oni metis min en lulilon, mi pensis ke jam venis komforto, sed oni ligis miajn manojn kaj piedojn (per vindotuko) kaj lacigis min, kaj kiam mi fariĝis saĝa kaj paroliva, mi diris min jam mi estos libera, (tamen) oni disponigis min al instruisto, kaj per ĝentiliga bastono kvazaŭ mortigis min kaj mi timegadis lin, kaj kiam mi pasigis tion, vi regigis pasion super mi tiel ke pro intenso de pasio mi ne povis priatenti alian aferon, kaj kiam timante adulton kaj pek-punon mi nuptis virinon, vi estigis gefilojn al mi kaj metis ilian amemon en mian enon, kaj (tiele) vi pereigis mian vivon ĉagrenigante min pri iliaj manĝaĵoj kaj vestaĵoj, kaj kiam mi transpasis tion, vi allasis maljunecon kaj malforton al mi kaj lasis doloradon al miaj membroj, kaj kiam mi transiris tion mi diris al mi eble kiam la morto atingu min, mi komfortiĝos, (sed) vi kaptigis min per mort-anĝelo tiel ke li glave kaj sendomaĝe forprenis mian animon (vivon) sekve de cent suferigoj, kaj kiam mi transpaŝis tion vi enmetis min en malluman tombon kaj en tia mallumo kaj neiveco vi sendis du noblajn personojn (anĝelojn Nakiro kaj Monkero, kiuj demandadas ĵus-entombigitojn ĉe unua nokto postmorta) ke: "kiu estas via dio kaj kio eatas via religio?" kaj kiam mi liberiĝis de tiu repondado, vi levis min el mia tombo, kaj en tiu ĉi tempo kiam vi starigis min en la malvarmo de reviviĝa tago kaj anstataŭ envio kaj pentiĝo vi enmanigis al mi mian leteron ke: 'Legu vian libron (leteron)!'

Ho dio! Mia libro estas tio, kion mi ĵus diris, ĉio ĉi baris min al via obeado, kaj pro multaj malfacilaĵoj kaj suferoj, mi ne plenumis la necesan servadon al vi; (tamen) kiu malhelpas vin por postmorta pardonado kaj pek-nuligado?"

Voko venis ke: "Ho Abol-Hasan! Mi pardonis vin pro miaj donemo kaj pardonemo."

FONTOJ:

1-MINOVI, Moĝtaba. *Ahval va Agvale Ŝejĥ Abol-Hasan Ĥaragani* (Statoj kaj Diraĵoj de Ŝejko Abol -Hasan Ĥaragani), Tehrano: Tahuri, 1988 (4a eld.), 181 p.
2-ESTELAMI, Mohammad. *Bajazid va Ĝonejd* (Bajazid kaj Ĝonejd), elektaĵoj el *Tazkerat-ol-Oŭlija* far Attar, Tehrano: Amir-Kabir, 1983 (3a eld.), (1a eld.: 1956), 32 p.
3- Encyclopaedia Iranica, Center for Iranian Studies, Columbian Univrsity, New York, London, Boston, Melbourne and Henley: Routledge & Kegan Paul, (la dato ne menciita), Vol. 1, Fascicle 4, p. 378.
4-MEJHANI, A.S. *Asrar-ot-Toŭhid* (La Sekretoj de l'Unueco), Diraĵoj de kaj rakontoj pri Ŝejko Abu-Said Abol-Ĥejr, kun 15-paĝa enkonduko far d-ro Ali Asgar Halabi, Tehrano: Safi-Aliŝah, 1997, 310 p.
5-http://www.farhangsara.com/fkharaghani.htm
6-http://www.uwaiysi.org/features_archive/2002_jun.html

Kelkaj diraĵoj de ŝejko
Abol-Hasan Ĥaragani

(cititaj el Minovi 1988. La numeroj en la krampoj montras paragraf-numeron en la libro)

Kaj li diris: "La viroj ne parolas de tie kie ili estas, ili venas pli malsupren por ke aŭskultanto povu kompreni (ilin). [272]

Kaj li diris: "Viroj kiuj supreniras (sukcesiĝas), per pureco (boneco) ili supreniras, ne per multeco de laboro." [290]

Oni demandis: "Kiu estas mistikulo?"
Li diris: "Mistikulo estas kiel birdo, kiu avidante nutraĵon eliris el la nesto, kaj netrovinte ĝin, volis reiri la neston kaj ne trovis la vojon, restis en konsterno kaj deziras iri hejmen, (tamen) ne povas." [539]

Ŝebli diris: "Mi deziras ke mi ne deziru (ion)", kaj li (Ĥaragani) diris ke: "Ankaŭ tio estas iu deziro". [520]

Kaj li diris: "Popoloj estas tri grupoj: unu (grupo) neĝenite de vi, ĝenas vin; kaj unu se ĝenite de vi, ĝenas vin; kaj unu kiun se vi ĝenas, ne ĝenos vin. [413]

Kaj li diris: "Kiom multe da homoj, kiuj vojiras sur la tero sed estas mortintaj; kaj kiom multe da homoj dormintaj sub la tero, kiuj estas vivantaj. [417]

Oni demandis lin: "Ĉu vin timigas la morto?" Li diris: "La mortinto ne timas morton; kaj ĉio per kio Li timigis popolojn pri la infero, ne estas (eĉ) ereto de tio, kion mi jam gustumis, kaj de ĉio, kion Li promesis al la popoloj pri la komforto (paradizo) mi ne deziras (eĉ) ereton. [462]

Kaj li diris: "Preĝado kaj fastado estas grandaj (aferoj), tamen pli bone estas eligi el la koro orgojlon, ĵaluzon, kaj avidon." [386]

Kaj li diris: "Lanajn vestaĵojn havas multaj, (sed) la kora honesto estas havinda; kian utilon havus vestaĵo? Se (nur) per havado de lanvestaĵoj kaj manĝado de hoedeo (pano) oni povus viriĝi (grandanimiĝi), azeno devus esti viro (grandanimulo), ĉar ĝi kaj havas lanvestaĵon (ŝarĝoselon) kaj manĝas hordeon." [372]
(sufioj vestis – kaj iuj el ili ankoraŭ vestas - lanaĵon, kaj laŭ multaj, deveno de la vorto *sufi* en la araba lingvo estas *suf*, t.e. "lano").

L' Amikino

Grandioza estis ŝi,
kaj el loĝantaro de l' hodiaŭ',
Rilata al ĉiuj vastaj horizontoj estis ŝi,
kaj kiom bone komprenanta la dirtonon de l' akvo kaj ter'.

Ŝia voĉo
kiel tristo, angoris de l' realo,
kaj ŝiaj palpebroj
al ni montris
la puls-vojon de l' elementoj,
Kaj ŝiaj manoj
foliumis
la pur-aeron de malavar',
kaj al ni puŝis
afablon.

Ŝi estis kiel sia soleco,
kaj ŝi interpretis la plej ameman kurbon de sia temp',
por spegulo,
Kaj pluv-stile ŝi plenis je l' freŝeco de l' ripet',
Kaj arbo-stile ŝi disvastiĝis
en la lumo-kreskejo.
Ĉiam ŝi vokis l' infanecon de la vento.
Ĉiam ŝi nodis afablo-ŝnuron
al la akvo-klinko.
Ŝi iun nokton
Tiom precize praktikis por ni
la verdan preĝon de l' amo
ke ni ektuŝis la emocion de l' tersurfaco,
kaj ni freŝiĝis kiel la dialekto de sitel-akvo.

Kaj multfoje ni vidis
kun kiom da korboj
ŝi iris por kolekti la beraron de bon-novaĵoj.

Tamen tio ne okazis
ke ŝi eksidu kontraŭ la verŝajno de kolomboj,
kaj ŝi iris ĝis la rando de l' nenio,
Kaj ŝi ekkuŝis malantaŭ humoro de l' lumoj,
kaj ŝi neniom pensis
kiom solaj restis ni
por manĝi pomon
inter konfuzo de pord-prononcoj.

De Sohrab Sepehri (1928-1980) pri Forug Farroĥ-zad pro ŝia ne atendita forpaso

Tradukis: d-ro Kejhan Sajjadpur

Floroj el "La Florejo" de Sadio

Unu el la plej interesaj partoj de la libro "Golestan" estas ĝia enkonduko. Sadio en tiu relative longa parto, post kelkaj vortoj pri la dio, la profeto kaj printempo, priskribas kial kaj kiel li verkis la libron. Kelkaj partoj de tiu ĉi enkonduko estas elektitaj kaj elpersigitaj por aperi ĉi-numere en tiu ĉi rubriko.

Dankon al Dio, la plej glora kaj la plej valora, kies obeado proksimigas al Li la korojn kaj kies dankado multobligas Liajn favorojn. Ĉiu spiro enirante vivon daŭrigas kaj elirante animon plezurigas; do du favorojn de ĉiu spiro oni ricevas kaj pro ĉiu favoro danki devas.

Kapablas kies manoj kaj lango,
Danki Lin laŭ Lia dia rango.
...
Estas pli bone ke la preĝanta homo,
Pardonpetu de Dio pro sia manko,
Alie neniu laŭ lia merito,
Kapablas esprimi sufiĉe da danko.
...

Al tapiŝanta eosta vento Li ordonis etendi verdan tapiŝon kaj al mamnutranta printempa nubo Li diktis kreskigi sur la lulilo-tero infaneskajn plantojn. La arbojn Li vestis per verda folio-robo kiel Noŭruza* vesto kaj pro alveno de printemp-sezono sur infaneskaj branĉoj Li surmetis ĉapelon de burĝono.

Kansuko fariĝas dolĉa sukero per lia forto kaj daktilkerno fariĝas alta palmo per lia varto.

Nubo, vento, luno, suno kaj ĉiel' laboras,
Por ke vi gajnu panon kaj ne manĝu neglekte,
Ili ĉiuj por vi okupatas kaj obeas,
Ne estas juste se vi ne obeu respekte.

Tradukis: d-ro Kejhan Sajjadpur

*Noŭruzo: Laŭvorte signifanta "Novtago", ĉar ĝi estas la unua tago de la novjaro laŭ la irana kalendaro. Ĝi fakte estas la unua tago de printempo (21a de marto), kiun Irananoj festas tradicie de jarmiloj antaŭe, i.a. per vestado de novaj vestoj.



Ruzo kaj truko de la virino!

Tradukis: (f-ino) M. Fahmi

En malnova tempo, estis viro, kiu havis kvar edzinojn*. La edzinoj estis ruzaj unu pli ol la alia, kaj ĉiu el ili iel trompis kaj priplukis lin. La viro tiom estis sofukiĝinta (laciĝinta) de iliaj ruzaĵoj, ke fine li ellasis ilin kaj ekvagadis tra la urboj por vidi, aŭdi kaj kompili rakontojn pri la virinaj ruzaĵoj kaj fari libron el tio sub la nomo de '*virina ruzeco*' kaj tiele elverŝi ĉion el sia koro.

La viro ekis iri en la urbojn, ade promenis, vidis kaj demandis, ĝis li ekvidis sin kolektinta grandan libron pri la hipokreteco de la virinoj. Li intencis reiri al sia urbo. Trapasante la urbojn li alvenis al Esfahano. Estis sumero kaj la vetero estis varma. La mizera viro tro laca de pied-irado, vidis pordegon de riĉula domo kun peronoj ambaŭ flanke. Li iris kaj eksidis sur unu el ili. Apenaŭ li estis sidanta, ke la pordo de la korto restis ne para kaj tra ĝi ekaperis la kapo kaj kolo de virino tre bela.

La viro malgraŭ sia abomeno kontraŭ virinoj vidante ŝin transformiĝis en alian anim-staton, senvole ekstaris kaj salutis. Ankaŭ la virino vidante la palan vizaĝon de la viro konstatis, ke la saluto ne sensignifa estis. Ŝi klinante la kolon respondis al la saluto kaj demandis pri li kaj lia laboro.

La viro, kies buŝo jam saliviĝis vidinte la virinon, respondis: "fremdulo en via urbo! Ĵuras mi, la virinoj tiom trompis min, ke mi ade vagas tra la urboj por skribi tion, kion mi per miaj propraj okuloj vidas kaj de la popolo aŭdas pri virinaj ruzaĵoj. Post la reiro al mia urbo mi faros libron el tio, por ke ĉiu sciu kiaj ruzulinoj ili estas".

Kiam la virino aŭdis tiujn vortojn, diris en sia koro (ĉe si): "En plagon mi ĵetos vin, ke vi plu ne kuraĝos enmeti la piedon en niajn ŝuojn (enmiksi vin en nian aferon)." Poste ŝi diris al li: "Kial ĉi tie vi sidis? Bonvolu veni en la korton, ne timu, krom ni neniu estas en la domo. La viro de-dion-peteganta (dezirege), sekvis ŝin. Ili ambaŭ eniris ĉambron. La viro vidinte la lokon konvenan volis elmontri la amon, sed la virino ne permesis kaj diris: "Vidu, ni estas solaj en la domo, sidu iom mallaciĝi". Poste ŝi iris kaj kun du bovloj da ŝorbeto revenis kaj metis unu el ilin antaŭ lin kaj la duan ŝi tenis en la mano. La viro por atingi la celon kiom eble plej rapide unuspire fortrinkis la ŝorbeton kaj ankoraŭ li ne metis la bovlon surteren ke la pordo-frapo de la korto eksonis. La virino aŭdinte tion frapis al si la kapon kaj diris: "Dio umu vin!"

Kiam la viro vidis la embarasitan virinon, diris: "Damo, kio okazis, kiu frapas la pordon?"

La virino respondis: "Ho ruiniĝinta domo! Ah, bone estus se viaj piedoj estus rompitaj kaj vi ne estus enveninta; estas la edzo. Nu, ne atendu, tuj eniru en tiun komodon kaj restu silenta, se li vidu vin, la plej granda peco de vi, estos via orelo (li diserigos vin)". La mizera viro embarasita, enŝoviĝis tuj en la komodon kaj tenis al si la spiron en la brusto

(eĉ spir-sonon ne eligis). La virino haste ŝlosis la komodon kaj iris malfermi la pordon de la korto. Kaj revenis kun la edzo.

La timanta viro rigardis tra la fendeto “Ho vah! Kia edzo, kvazaŭ blanka monstro”. La edzo enirinte la ĉambron ekis: “Por kiu vi tuf-tranĉita (senhontulino), havigis tiun ĉi ŝorbeton? Post mi, kiu venis ĉi tien?”

La virino elmontrinte sin maltrankvila kaj pentema, diris: “ Ho viro, vi vere bone konas min, kaj vi scias ke mi nek perfidis nek perfidos vin; post via eliro, mi venis fermi la pordon post vi, ke iu grandaĉa fiviro perforte ekenvenis kaj volis malvirtigi min. Mi estis sola, do mi devige lin regalis ĝis vi venu. Ade mi petis la dion, ke vi alvenu kiom eble plej rapide kaj punu lin. Dank’ al dio, realiĝis mia peto.

La viro aŭdinte tion ĵetis rigardon al ĉirkaŭo kaj indigne minacis: "Kio? Kie estas tiu friponulo? La virino aludis al la komodo kaj diris, li estas kaŝita en ĝi. La edzo ekkriis: "Glavon mian alportu por venĝi lin. La virino saltis angulen kaj elprenis la glavon de sur la komodo kaj venis antaŭ la edzon kaj staris, sed kiam la viro etendis la manon kaj prenis la glavon, la virino ekridis kaj diris:"Vi forgesis la veton de brusto-osto (ia memor-ludo inter du personoj, kio komenciĝas per ekrompo de brusto-osto de ĵus-manĝita kokinaĵo far la ludontoj, kaj finiĝas kiam iu malgajnonte prenas de alies mano ion ajn)!”. La viro vidinte sin tiel facile malgajninta, mirkonsternite restis senmova por kelkaj sekunderoj, kaj poste ekĵetis la glavon, kaj ofendite eliris el la domo kolere.

Kiam la virino certiĝis pri eliro de la edzo, venis al la komodo kaj malfermis ĝin kaj ekvidis la viron, kiu estis sveninta! “Ho ve, Dio kompatu” ŝi diris kaj plu ne atendante, tro pene elirigis la viron kaj akvon ŝprucis sur lian vizaĝon. Kiam li venis al si (konsciiĝis) kaj bonfartiĝis, la virino diris: "Nu, stariĝu, baldaŭ alvenos mia edzo, ne prokrastu”.

La viro kun bedaŭro rigardis ŝin kaj diris: "Virino febla, Dio ne pardonu vin, kia truko estis tiu ĉi, kiun vi altrudis sur min?”

La virino respondis: “Ĉu vi mem ne diris, ke vi volas ekscii pri la ruzaĵoj de la virinoj? Nu, tiu ĉi estis iu artifiko, kiu estis necesa por la fino de via libro, iru kaj ne forgesu, ke la ruzaĵoj de virinoj ne estas unu aŭ du (malmult-nombraj)!


Far Elahe Ŝadidi

Fonto:
Golaga (perslingva satira revuo), Aŭgusto 2003, n-ro 5, Iranaj rakontoj, kompilita kaj verkita de Sejjed Abolgasem Ŝirazi, Elektita de Valiollah Dorudian

Abjane-Vilaĝo: Vivanta Muzeo



Asad Mahbub

La Situo
Abjaneo, unu el la plej famaj vilaĝoj de Irano, situas en Esfahan-provinco, 38 km-ojn nord-oriente de Natanz-urbo, kaj 18 km-ojn de la vojo konektanta Natanzon al Kaŝan-urbo. La vilaĝo, 2500 metrojn super la marnivelo, konstruitas sur nord-okcidenta deklivaĵo de Karkas-monto; supre de 25 km-ojn longa kaj verda valo de Barz-rud (Barz-rivero).

La Klimato, Agrikulturo kaj Bredado
La klimato estas malvarma – ĉefe pro la alteco de montara regiono, sur kiu la vilaĝo trovas sin - kaj ekzistas sufiĉa akvo, kaj rivere kaj fonte, por ĝuigi al la loĝantaro fruktodonan agrikulturon. La ĉefaj kultivaĵoj de la loko estas pomo, pruno, tritiko, terpomo kaj alfaalfa. La plej bredataj animaloj en Abjaneo estas kaproj, sed oni bredas ankaŭ ŝafojn kaj aliajn brutojn – kio estas unu el la ĉefaj ekonomi-rimedoj de la vilaĝo. Virinoj teksas tapiŝojn nur en malgranda kvanto. Ili ankaŭ faras giveojn* (t.e. teksitaj ŝuoj kotonaj).



Historiaj Valoroj
Kiel jam trovite de la fakuloj, unu el la plej efikaj metodoj por konservado de historiaj konstruaĵoj kaj kvartaloj, estas vivantigi ilin per injektado de realaj kaj ĉiutagaj funkcioj, ekz-e se malnovan domon historie valoran oni transformu en gastigejon, aŭ vendejon, la okupantoj mem ĉiam zorgos pri ili, ĉar la laboro ilia postulas tion. Abjaneo, tute nature konserviĝis tiel ĉi! Ĝi fakte neniam malpleniĝis de loĝantoj, do ĉiam prizorgatis kaj restis sana. Unesko registris Abjaneon kiel historian vilaĝon, ene de kiu la malnova Irano ankoraŭ videblas. Notinda karakterizaĵo de Abjaneo estas tio ke kaj la fizika medio kaj la vivmaniero de la loĝantaro bone konserviĝis dum longega periodo. Eble unu el la ĉefaj kialoj por tio estas ties lokiĝo for de ĉirkaŭaj urboj, kio eble malmultigis inter-agadon de la vilaĝo kun la ekstera mondo. Sekve, nun ĉio en la vilaĝo verŝajnas originala kaj malnov-stila. Samo validas ankaŭ pri ceremonioj, kostumoj kaj … la dialekto. Ĉio ĉi igas Abjaneon unika relative al plejmulto de aliaj iranaj vilaĝoj, kiuj pro influiĝo de la proksimaj urboj, tuj urbeskiĝis, kaj forgesis pri la origina stato de si.


> **En Abjaneo oni povas vidi la plej altan gradon de adaptado inter homo kaj la medio.**

Planado kaj Desegnado
La vilaĝo estas formiĝinta laŭlonge de la rivero, por ĝui maksimuman sekurecon kontraŭ inundoj, lokaj ventegoj kaj atakoj de malamikoj. Krome, ankaŭ tri kasteloj estis konstruitaj por defendado de la vilaĝo. La domoj estas tiel dense konstruitaj ke ekzistas nur tre mallarĝaj aleetoj; ĉio ĉi ankaŭ utile helpas la loĝantaron kontraŭ la malvarma klimato. Tiu-cele ankaŭ la someraj kaj vintraj ĉambroj arkitekture diferencas unu de la alia. La situo de la vilaĝo sur la deklivaĵo, rezultis en deklivaj vojoj kaj ŝtupar-forma dom-konstruado, sekve de kiu, tegmento de domo estas la korto por la alia domo.

Konstru-materialoj
Ĝenerale, daŭremajn arkitekturaĵojn garantias restemaj konstrumaterialoj. Certe ĉia klimato postulas tre specialan materialaron, se la celo estas longdaŭreco de konstruaĵoj. Ĝuste tial iam domoj aĝas multe, aliam malmulte. En Abjaneo, material-elekto por konstruado, sekve de ties longa historio kaj spertado, estis/as tre taŭga kontraŭ la lokaj klimat-trajtoj. Ekz-e la konsisto de la brikoj estas tia ke ju pli multe la pluvoj malsekigas ilin, des pli fortikiĝas ili. Do la ofta pluvado de la loko ne nur ne difektas konstruaĵojn, sed eĉ pli fortigas ilin.

Laŭ-klimata Planado kaj Orientiĝo
Precipe en malnovaj tempoj, kiam ne ekzistis la modernaj divers-specaj varmigiloj aŭ malvarmigiloj, laŭ-klimata desegnado kaj planado vivo-gravis. Do plej ĉefa faktoro formanta konstruaĵojn, ĉu en skalo de unu domo, ĉu en skalo de la tuta vilaĝo aŭ urbo, estis (aŭ devis esti) klimataj karakterizaĵoj de la loko. Tial, en malvarmaj regionoj, domoj emis pli-proksimiĝi unu al la alia, kio estigas mallarĝajn kaj malmultajn aleojn, kaj male en la varmaj regionoj ĉiu domo, kaj eĉ eroj de sama domo, devas distanciĝi de la aliaj, por enlasi plej multan venton, aŭ aer-fluon.
Abjaneo, situante en malvarma montara regiono, krom ĵus-diritaj punktoj, utiligado de sunlum-varmo tre tre gravas. Tial, cele al la plej multa ensorbado de sunenergio, la domoj direktitas al oriento estigante – aliflanke – tre harmonian kaj tutecan formon por la vilaĝo.

Seksdifinaj Pordo-frapoj
La ornamitaj lignaj enir-pordoj de la domoj ĉefe estas du-klapaj, ĉiu el kiuj surhavas frapilon por iu sekso – unu specifa frapil-formo por la virinoj, ali-forma por la viroj. Tiel, samkiel okazas en multaj aliaj vilaĝoj iranaj, la domanoj povas distingi de la frap-sono, ĉu la pordofrapanto estas viro aŭ virino, kaj laŭ tio prepari sin por la renkontiĝ-maniero. Flanke de multaj dom-enirejoj ekzistas malgranda masonita benkaĵo, sur kiu kaj la preterpasantoj lacaj povas ripozeti minutojn, kaj la loĝantoj mem povas sidi ekster la domo por vario.




Socia Kohereco
Kompare kun aliaj partoj de la lando, Abjaneo havas plej malmultajn analfabetojn kaj abjaneanoj speciale zorgis delonge pri la edukado de la knabinoj. En aliaj regionoj de la lando, precipe en vilaĝoj, ĝis antaŭ nelonge, eĉ alfabetiĝo de knabinoj ĉu en la lernejoj ĉu eĉ en la domoj ne estis akceptata per la socio.

Ankaŭ socia kohereco en Abjaneo estas konsiderinda. Ekz-e la enspezo gajnita de certaj kultivaĵoj, ĝis la 60a jardeko estis destinita por la plibonigado de sociaj komunaĵoj.

> **Tiu ĉi rimarkinda vilaĝo, malkiel multege de aliaj vilaĝoj iranaj, konservis siajn malnovajn ecojn – kostumajn, dialektajn, ceremoniajn, arkitekturajn - ĝis hodiaŭ, malgraŭ tio ke ĝia loĝantaro relative al la aliaj vilaĝoj, eble estas la plej alte studinta eĉ universitatnivele, ĉu enlande ĉu eksterlande.**

Konservemo pri Tradiciaĵoj
La plejmulto de la domoj, konstruitaj sur la deklivaĵoj, konsistas el tri aŭ kvar etaĝoj kun balkonoj kaj latisaj fenestroj, kio donas allogan aspekton al la vilaĝo regata per okra koloro de konstru-materialoj. Krom tio, la plej identigaj karakterizaĵoj de la vilaĝo estas la ekzisto de malnovaj konstruaĵoj kaj la konservemo de la loĝantaro pri la dialekto, kostumoj kaj multege de diversaj ceremonioj tradiciaj. Se temas pri la vestaĵoj, la viroj ankoraŭ vestas tre malstriktajn pantalonojn nigrajn, dum la virinoj surmetas longajn plisitajn jupojn kaj allog-kolorojn bluzojn kun fendoj ĉe ambaŭ flankoj. Ili kovras la harojn per foldita kvadrat-kaptuko.

Antikva Fajro-templo
En la mezo de la vilaĝo staras la restaĵoj de zoroastra fajro-templo (perse: *ataŝgah*, laŭvorte "fajrejo"). La templo, kion oni ankoraŭ nomas *ataŝgah*, datiĝas je Sasanida periodo, t.e. 226-636 p.K. Laŭ *Maxime Siroux*, elp. Maksim Siro, kiu komplete priskribis la konstruaĵon, la templo (bv. vidu la desegnaĵon), konstruita sur kruta deklivaĵo, estis klare videblea el la vilaĝaj domoj. Ĝi havis tri etaĝojn kaj estis konstruita en du fazoj (*Iranica Antica* 7, 1967). La malsupra etaĝo, la plej malnova parto de la konstruaĵo, el kiu partoj ĝisvivis hodiaŭon, probable datiĝas je 5a jc. p.K., dum, la pli supraj etaĝoj



konstruiĝis en la 7a jc. Nun, unu el la vilaĝaj vojetoj trapasas la mezan etaĝon, kiu siatempe entenis fajro-altaron kaj diversajn di-servajn ĉambrojn. La plej supra etaĝo, fakte estis iu kupolita "*ĉ(ah)artag*" t.e. kvar-kolonaĵo, kio ankoraŭ starantas kun detruita kupolo.

Unesko registries Abjaneon kiel historian vilaĝon, ene de kiu la malnova Irano ankoraŭ videblas.

Postrestaĵoj de Zoroastrismo

Por la abjanea loĝanto probale la kompleta konvertiĝo de Zoroastrismo al Islamo, okazis relative malfrue. Tion evidentigas certaj kutimoj malnovaj kiuj restemis inter ili ĝis la nuna tempo. La vilaĝanoj fiere montras sian konscion pri la antikvaj kutimoj de la vilaĝo. La popolo ankoraŭ memoras ke la funebraj kaj aliaj preĝoj, kiuj nun plenumiĝas vizaĝe al Mekko, antaŭe estis plenumataj al la suna direkto, finiĝontaj antaŭ la sunleviĝo.



Spuroj de ritoj celantaj instigi la popolon al disdonado de manĝaĵoj kaj trinkaĵoj al la malriĉuloj por gajigi la spiritojn de siaj forpasintaj gekaruloj – tre grava kaj disvastigita praktiko inter la zoroastranoj – troviĝas en multaj kutimoj nunaj de la vilaĝo.

Tamen la aserto de Siroux (*Anciennes voies et monuments routiers de la région d' Ispahan*, Mémoires de l'Institut français d'Archéologie Orientale du Caire 82, Cairo, 1971, pp. 20, 23, 221, 223), kredanta malfruan alvenon de Islamo al la valo Barzrud, t.e. dum la tempo de Ŝaho Ismailo (1502-24), ne povas esti prava, ĉar en la regiono ekzistas ankaŭ malnovaj moskeoj. Nek subteneblas lia aserto pri forfuĝo de multaj zoroastranoj el Abjaneo sekve de la ŝaha netolerado.

Deveno de Vorto "Abjaneo"

La vorto Abjaneo devenas de "viona" signifanta laŭvorte "salik-busko"-n. En la loka dialekto, nomata la abjanea, "vej" signfas "saliko"-n. La abjanea dialekto, kiel nombro de aliaj proksimaj kaj similaj dialektoj kiuj estas parolataj en la vilaĝoj ĉirkaŭ Kaŝan-urbo kaj ĝiaj najbaraj regionoj, apartenas al la Centraj Dialektoj de Irano.

Islamaj Monumentoj

Abjaneo disponas ankaŭ pri rimarkindaj islam -periodaj monumentoj kaj domoj. La ĉef-moskeo de la vilaĝo enhavas fajnan lignan mehrabon* (t.e. niĉo en moskeo direkte al la Mekko). La mehrabo estas 2x1.08 metroj kaj kreiĝis en 1084-5 laŭ la ordono de Abu-Ĝafar Mohammad-ebne Ali. Sur ĝi estas detale engravuritaj koranaj versoj kaj en simpla kaj en ornamita kufea* skribo (Kufeo* estas urbo en nuna Irako kaj kufean skribmanieron, kio pleje uziĝas por konstuaĵ-ornamoj, karakterizas regado de horizontalaj kaj vertikalaj linioj de la literoj). En la moskeo ekzistas ankaŭ eĉ pli malnova valoraĵo: katedro kreita en 1073-4, kio jam ripete ripariĝis. Ankaŭ la moskeo mem ripariĝis en 1322.

Vivanta Muzeo

Abjaneo estas nomata ankaŭ "La enirejo en la historion de Irano" ĉar diversperiodajn histori-tavolojn oni povas vidi en la vilaĝo. En multaj domoj ankoraŭ ekzistas fajencoj kelkjarcentojn aĝaj. Multaj novedzinoj ankoraŭ fiere vestas edziniĝ-robon hereditan de siaj avinoj.

Ĉio ĉi, transformis Abjaneon al kvazaŭ arkitektura kaj antropologia muzeo, en kiu tamen la ĉiutaga vivo daŭras. Rezulte de ĉio ĉi, Abjane-vilaĝo delonge estas unu el la plej famaj kaj plej vizitataj vilaĝoj de Irano far turistoj enlandaj kaj eksterlandaj.

Fontoj:

www.abyaneh.com
www.tehran.stanford.edu.Iran
www.iccim.com.English.Iran
www.iccim.org.English.Magazine
www.iranparadise.com.Iran.Abyaneh.htm
www.kelisa.org.IRAN.places.ABYANEH.htm
Encyclopaedia Iranica, Center for Iranian Studies, Columbian Univrsity, New York, London, Boston, Melbourne and Henley: Routledge & Kegan Paul, (la dato ne menciita), Vol. 1, Fascicle 4, p. 402-5.

Sen komprenemo via, neniel efikos diradoj niaj!

Kiel egaligi la (mal)facilecon de E-o por ĉiuj

Ĉu Esperanto venkis? Ne venkis? Aŭ malvenkis? Certe ĝi ne malvenkis, ĉar vi estas leganta tiun ĉi materialon en ĝi. Esperanto nek finvenkis, ĉar ne tiel tutmondiĝis. Do ĝi venkis nur certa-grade, ĝuste tiom, kiom ni E-istoj klopodis por ties venko. En tiu ĉi artikoleto, la lingvaj kialoj por la nevenkado de Esperano traktiĝas iomete.

Bonvole provu legi kaj kompreni la suban tekston:

> **"Az ketabĥaneo ĉandtajn ketabojn amanatis man. Jek az anha darbareje Esperanto astis. An ketabo goftis ke Esperanto zabano asana astas."**

Plejeble vi nenion komprenis krom tio ke la teksto utiligas Eperanto-finaĵojn kaj iel rilatiĝas al Esperanto. Do nur la finaĵoj estas konataj por vi. Sed perslingvanoj (aŭ aliaj kies patrinlingvo proksimas al la persa), kiuj neniom lernis Esperanton, kaj eĉ ne priscias Esperantajn finaĵojn, kaj nur lernis la latinajn literojn, preskaŭ ĉion povas kompreni. Ĉar: 1- ĉiuj vortradikoj estas persdevenaj (anstataŭ la romandevenaj radikoj de Esperanto) do la signifo kompreneblas. 2- la vortordo imitas la persan (anstataŭ la romanlingvan), do oni ne devas puzle movetadi la frazerojn por povi diveni la ĝustan tekstsignifon.

Por ke vi povu kompreni la supran teksteton dulinian, vi devas lerni 15 vortojn kaj/aŭ radikojn.

En la sekvanta versio de la sama teksto, la Esperantaj solstarivoj estas utiligitaj; vidu nun kiom vi povas kompreni ties signifon:

> **"El la ketabejo ĉandtajn ketabojn amanatis mi. unu el ili pri Esperanto astis. Tiu ketabo goftis ke Esperanto zabano asana astas."**

Probable la teksto ankoraŭ ne kompreneblas. Bone, nun ĉiuj vortoj iĝos esperant-radikaj (t.e. romanaj):

> **"El la librejo kelkajn librojn prunteprenis mi. Unu el ili pri Esperanto estis. La libro diris ke Esperanto lingvo facila estas."**

Ŝajnas ke ankoraŭ io ĝenas vin! Jes, la vortordo! Bone, ankaŭ tion mi nun elpersigas por vi romanigante ĝin:

> **"Mi prunteprenis kelkajn librojn el la librejo. Unu el ili estis pri Esperanto. La libro diris ke Esperanto estas facila lingvo."**

Sed, ĉu vere Esperanto estas facila lingvo por perslingvanoj, kiom ĝi estas por romanidlingvanoj?

Tamen nun vi konscis pri tio ke en E-io la inversan itinieron neniu plenumas por la perslingvaj E-istoj, nek por iu ajn alia E-isto kun ne-roman-devena patrinlingvo! Eble el ĉiu mil homoj, nur cent homoj jam aŭdis pri E-o. El la cent eble nur dek komencas lerni ĝin. Kaj el la dek nur unu ellernas E-on kaj fakte aldoniĝas al la monda E-istaro. Kiel konate multaj komencintoj de E-o forlasas la klasojn sentante seniluziiĝon pri la miteca facileco de la lingvo.

Ĉu E-o ne estas facila? Ĉu ĝi malfacilas? Ĉiuokaze, ĉu ties facileco – aŭ malfacileco – estas sama por ĉiuj kun diversaj patrinlingvoj?

Certe E-o ne estas facila absolute – sed relative, jes ĝi pli facilas. Relative al eble ĉiuj naturaj lingvoj, E-o estas pli facila. Do oni povas diri ke ĝi estas la plej facila el ĉiuj naturlingvoj.

Kion ni povas fari por samomigi la facilecon de E-o por ĉiuj? Se pensi damoktarie, ideale ties facileco indus esti sama por ĉiuj nacianoj/lingvanoj de la mondo.

Jen kelkaj konkretaj proponoj:

A- Pri la radikoj kaj vortfarado

1. Utiligi la bazajn radikojn kune kun diversaj afiksoj ka finaĵoj por esprimi diversajn ideojn, anstataŭ tuja enkonduko de nova radiko en Esperanton kiel nelogsmon. Se iam enkonduko de neologosmo estas certa:
2. Ekde nun neologismoj deriviĝu el la ne-romanaj lingvoj. Ĉar la romanaj jam abundas en E-o.
3. Eĉ por jam ekzistaj vortradikoj, oni aldonu ankaŭ ne roman-devenajn radikojn en E-on kiel neologismojn.

La novaj radikoj enkonukotaj en E-on, endus elektiĝi el ĉiuj lingvo(grupo)j – kiel jam dirite krom la romanaj – laŭproporcie de la nombro de la parolantoj de ĉiu lingvo (grupo).

B- Pri vortordo en la frazoj

Ni bonvenigu kaj instigu plej diversajn vortordojn en la esperantaj frazoj, tiel ke parolantoj de ĉiuj naciaj lingvoj sentu memfidon esprimi sin laŭ la patrin-lingva vortordo. Nome ni allasu ankaŭ la aliajn vortordojn krom la tipa SVO (Subjekto, Verbo, Objekto). T.e. kvin aliaj SOV, OSV, OVS, VSO kaj VOS. Ekz-e por perslingvanoj, kaj francoj paroli kaj skribi laŭ SOV estus multe pli facile kaj "nature".

Libro-prezento

Ek al leg'! Legolibro por perfekti^go en Esperanto. Komp. H. Alos, K. Velkov. Red. L. Trifonĉovski. Sofio, 1991. 92+196p. 21cm. Laŭgradigitaj originalaj tekstoj. Du-voluma.

La libro enhavas kolekton de diversaj legaĵoj el variaj fontoj. La libro komence uzas facilajn verkojn kaj kunekun la progreso de leganto, oni trovas pli altnivelajn materialojn, kaj fine de la libro atingas poeziaĵojn kaj literaturajn tekstojn.

Laŭ la kompilantoj de la libro "... nia emo estas iel tuj helpi la iniciatemajn instruistojn kaj memlernantojn per modernaj altnivelaj internaciaj materialoj nepre simplaj por perfektigo lingva kaj stila ...".

La libro estas du voluma, sed mi finlegis nur la unuan kajeron.

Apena papilioj en Bergen-Belsen. Trevor Steele. Vieno, 1994. 148p. 23cm. Romano pri la spertoj de juna anglo en Germanio de la 60-aj jaroj.

Jen interesa romano por maz- kaj alt-nivelaj esperantistoj. La etoso en kiu okazas la rakonto estas iom nekutima kaj ĝuste pro tio pli interesa. Legante la libron, mi multe pensis pri la post-milita vivo de militkaptitoj kaj eĉ ordinaraj homoj en tiama Germanio (Post la dua mond-milito), stranga sento de kompato kaj vakuo. Por sperti la tuton de tiu sento, mi legis la libron senĉese. Sed la fino de la romano estis tute ŝokiga kaj ne atendita. Ĝuste pro tio ne atendita fino, en mi restis tiu sento de vakuo.

Plezura legado atendas vin en tiuĉi ne-tro-granda romano.

Miaj instrulaboro kaj impresoj en Irano

1-a parto

Tereza Kapista / Serbio

Preskaŭ samtempe venis retpoŝta mesaĝo de Renato Corsetti kaj Atilio Orellana kun demando ĉu mi pretas gvidi kurson en Irano kadre de la UEA programo "*Lingvo de la Paco*" por rifuĝantinoj el Afganio en Irano. Unue kaptis min penso pri ne Irano sed Persio pri kio mi tiom multe aŭdis. Poste la vorto "rifuĝintoj" bedaŭrinde tre bone konatas en mia lando. Mi sentis tion kiel vokon al helpo al donado de la espero. Do, mi sen iu ajn longa pripensado akceptis vojaĝi al Irano kaj fari tion kion ili komisiis al mi.

Post iom da komplikaĵo mi havis informon ke la bileto estas pagata. Intertempe mi jam korespondis kun Reza Torabi kiu organizos mian restadon en Irano. Ankaŭ mi uzis tiun tempon por informiĝi pri Irano. Mi vizitis Ambasadejon de Irano en Beogrado, kiuj afable sendis min al ilia Kultura Centro kiu ekzistas en Beogrado. Tie mi estis amike akceptita kaj tuj ricevis 4 librojn pri Irano donace, en serba lingvo. Jam la titoloj montris iun kunligon kun mia lando kaj Irano. La unua estis "Persa kulturo sur teritorio de Jugoslavio" kiu aparte estis interesa por mi. La dua, "Irano, la lando de la eterneco". La sekvonta "Esploroj de iranologoj sur teritorio de eksa Jugoslavio". Kaj la kvara estis monata revuo "NUR" por kulturo kaj islamaj temoj kiu aperadas en Beogrado. Mi ankaŭ ricevis video-diskon pri Irano. Do, informoj ne mankis. Niaj du esperantistinoj Katarina kaj Ana Pigl kiuj studis la persan lingvon kaj nun revenis el Irano pruntedonis al mi manton (longan mantelon) kaj kaptukon nomatan maknae. Mi trankvile ekis al la lando de eterneco!

Mia aviadilo alteriĝis al Irano la 26an de novembro, en la jaro 1382-a laŭ irana kalendaro. Ĉe flughaveno atendis min s-ro Reza Torabi. Ĉe lia domo okazis mia unua irana vespermanĝo, preparita de lia edzino Fariba. Do, mi jam dum unua manĝo konstatis ke iranaj manĝaĵoj estas specialaj kaj bongustaj. Ŝi sendis la invitleteron al mi, ĉar en Irano virino devas virinon inviti.

Mi tranoktis ĉe s-ino Ŝahin Sejedzade. Dormado sur tapiŝo kaj matraco, denove irana tradicio … .

La duan tagon mi flugis tuj al Maŝhad. Pliaj 1000 km for de Tehrano. Tie atendis min 3 junulinoj-afganaj kaj Said kiu instruis ilin kaj meritas laŭdon pro pionira laboro en tiu urbo. La junulinoj nigre vestitaj kun strikta kaptuko, sed ruĝegis la rozo en ilia mano, kiun al mi alportis. Agrabla surprizo!

Mi loĝis en bona Hotelo. Krom la ĉambro mi havis ankaŭ kuirejon, ĉar la irananoj havas kutimon vojaĝi kun familio kaj kuiri mem. Do, la hotelo ne havis restoracion, nek trinkejon ĉar oni alkoholaĵojn ne trinkas. Vi povas mendi nur teon aŭ akvon kaj trinki en via ĉambro aŭ en salono ĉe enirejo. Sed samovaro estas en kuirejo kaj vi mem povas kuiri teon. La forno funkcias per gaso kaj en tuta lando oni nur tion uzas ankaŭ por hejtado de la domo.

Jam la unuan tagon mi komencis instruadi. La intereso estis grandega. La ejo malgranda. La kursanoj devis stari, ne sufiĉis loko por ĉiuj. Pro tio kelkaj poste decidis veni. Nur post la unuaj studhoroj mi eksciis ke la ejo apartenas al AFESPO. (Afgana virina Esperanto Klubo). Mi instruis kaj por komencantoj kaj por progresantoj. Grandega problemo por mi estis malfruado de la kursanoj al studhoroj, simple tio estas irana kutimo mi eĉ po 30 minutojn devis atendi. Poste mi klarigis al ili ke en Eŭropo ni tion ne faras kaj mi petas ilin venadi akurate, post 2-3 tagoj ili alkutimiĝis venadi pli akurate. La unua impreso kiam mi eniris la lernoĉambron estis tiuj nigraj tukoj! Helas nur la vizaĝoj! Poste mi ekvidis la brilantajn okulojn de tiuj belegaj knabinoj, ĉarmaj, scivolemaj kiuj atenteme aŭskultis ĉiujn miajn vortojn. Mi sentis ke ili simple suĉas per okuloj miajn vortojn kaj la okulbriladoj, honestaj ridetoj

montris ke ili vere sopiras scion. La kontakto estis tuja, sincera kaj reciproka. Ili simple ĝuis miajn lecionojn. Mi ne sciis ke en Irano la virinoj ne rajtas kanti kaj mi kantigis ilin kaj ili komprenante tion ke la kantoj apartenas al la leciono kantis, ĉiam pli laŭte kaj ĝoje. Estis interesaj aferoj kiam mi ekz. instruis la tagojn en semajno kaj demandis: kiu tago estas la unua labortago en la semajno kaj la respondo estis: sabato. Kaj la festotago? Vendredo. Jes, en Irano estas tiel. Kiam ili lernis pri kalendaro mi demandis la unuan tagon de la jaro kaj montriĝis ke en Irano la unua tago de la jaro estas 21-a de marto, la irana Novjara Tago .En Irano ili same havas 12 monatojn sed la unuaj 6 monatoj havas po 31 tagoj, la sekvontaj 5 monatoj po 30 tagoj kaj la lasta estas 29 tagoj. Sed ili ankaŭ konas la tiel nomatan eŭropan kalendaron, ĉar preskaŭ ĉiuj lernas la anglan.Ankaŭ en kalendaroj estas ambaŭ sistemoj stampitaj. Tio estis mia feliĉo ĉar mi ne devis perdi tempon instrui ilin skribi laŭ latina alfabeto, la persa skribmaniero estas tute alia. Ili komencas skribi sur la lasta paĝo de la kajero kaj skribas de dekstre maldekstren. Do kun literumado ni ne havis problemon. Ankaŭ surprizis min ke ili ne havas problemon kun akuzativo ĉar ili havas iun similan regulon. La korelativoj same facile estis lernitaj. La prononco estis vere bonega nur foje ili anstataŭ o prononcas u. En skribaj ekzercoj mi konstatis ke ili la nomojn ne skribas per majusklo sed mi komprenis, ĉar en persa tio ne ekzistas. Ankaŭ korektante la hejmtaskojn mi konstatis ke preskaŭ ĉiuj skribas preslitere ne kunligante la literojn. Do mi montris kiel skribi kaj kunligi la literojn. Mi multe desegnis sur tabulo ĉar ne havis sufiĉajn ludilojn kaj alportadis veran panon, fruktojn. Interesaj estis ankaŭ la -malamikaj vortoj - kie en irana signifas kiu? Ke estas same ke, samsignifa. Ŝeŝ en la persa estas ses do tre simila al nia ses. Sed kun en la persa signifas postaĵon. “Se” signifas numeron tri. Sed pli ol 50 vortojn mi trovis kiuj similas kaj preskaŭ samsonas kun serba, pro tio ĉar multaj vortoj devenas el turka lingvo kaj la turkoj regis ĉ-500 jarojn miajn landpartojn kaj ni akceptis multajn turkismojn, sed iu diris ke eblas ke la persaj vortoj influis la turkan lingvon. Kiu scias, tamen ili ĝojis kiam mi ion komprenis de ilia interparolado. Post iom da tagoj mi konstatis ke la afganinoj- rifuĝantoj ne rajtas frekventi la regulajn ŝtatajn lernejojn kaj pro tio sopirante scion ili lernas ĉiujn eblajn kursojn: kiel flegado de malsanuloj, komputiladon, anglan lingvon, kaligrafadon, kelkajn manlaborojn ktp. do ankaŭ E-on. Ili jam mem gvidas kursojn al aliaj pri komputilado! Sed menciinda estas ilia lernado de la angla. Tion oni povas fari en Irano en 5 ŝtupoj. La 1-a ŝtupo se vi nur deziras lerni iomete paroli sen skribado kaj sen legado. La 2-a se vi deziras ankaŭ lerni legi. La 3-a se vi deziras kaj skribi kaj legi kaj paroli. La 4-a se vi lernas nur lingvaĵojn de iu fako kun



Moskeo Goharŝad



Imamo Reza maŭzoleo - Maŝhado



En la oficejo de Irana Esperanto-Centro ,Tehrano

skribado kaj legado sed sen iu alia literatura scio. La 5-a estas la vera kurso kiel en Eŭropo kiam vi lernas paroli, skribi kaj legi. Certe tio estas pro nescio de latinaj literoj kaj instrui tion forprenas sufiĉe da tempo kaj kiu estas ekz. vendisto sufiĉas ke sciu nur iomete demandi pri la deziro de la aĉetanto sen skribado kaj legado.

Antaŭtagmeze mi havis liberan tempon kaj ĉiam venadis 2-3 junulinoj gvidi min al Muzeo de Imam Reza, malnova bazaro aŭ al Moskeo de Imamo Reza; ĝi estas grandega kaj belega! Verdire Maŝhad estas pilgrima loko kien venadas el la tuta lando en specialaj tagoj. La islamanoj, foje ĝis 2 milionoj da homoj alvenas. La ega placo estas kovrita per diverskoloraj oniksaj marmoroj. En centro estas la loko kie la viroj lavas la piedojn antaŭ eniro. Mi ne vidis virinojn fari tion, kaj mi ne scias kial. La enirado estas aparta por virinoj kaj virinaj deĵorantoj traserĉas la virinojn por trovi la malpermesitajn objektojn (militiloj, fotilo, ktp) Ni ĉiuj devas elŝuiĝi kaj meti la ŝuojn en nilonan sakon, enporti en moskeon kaj tie doni al gardejoj, ĉar estas multaj grandegaj por gardi kelkmil ŝuojn! Kiam oni eniradas tra la pordo devas karesi la lignan gravuraĵon kaj fine kisi la pordegon. Ene oni povas preni parteton de argila plata aŭ ronda peco ĉar kaŭrante la frunto devas esti sur ĝi. La Moskeo estas neimagebla en interno, ĉiuj muroj estas kovritaj per speguletoj etaj, diversformaj kiuj formas florojn aŭ stelojn.

Apud kaj super la tombo de Imamo Reza la murkovrilo estas el arĝentaj kaj orumitaj partetoj. Ĉie estas koridoroj same brile aspektantaj kaj sur la planko la belegaj persaj tapiŝoj, do mi ne devis viziti ekspozicion de tapiŝoj; ĉiujn belajn kaj specialajn mi vidis en moskeo. Sur la apudmuraj bretoj estas Koranoj per ledo binditaj, orumitaj ornamaĵoj en granda kvanto, vere belaj! Oni prenas ĝin kaj post uzado remetas al bretoj. Kiam la homoj venas el aliaj urboj ili en moskeo manĝas, trinkas teon el termosoj, mi vidis patrinon kiu mamnutris la infanon, maljunulino dormis sur tapiŝo kaj familianoj en cirkloj sidas, manĝas kaj babilas tute trankvile sen hastado. Ili la tutan tagon pasigas tie kaj vespere forvojaĝas. La plej ekscitiga estis la sceno apud la tombo de Imam Reza kion ĉirkaŭas orumita dika reto (granda kaĝoforma altas ĉ.2m.) kiun ĉiuj volas tuŝi por ke la deziroj kaj petoj estu plenumitaj Tie estas iaspeca stampedo kaj ili tiras unu la alian por sukcesi alproksimiĝi. Kelkaj virinoj falas en transon kaj ploradas, kriadas, petegas, ĝemas, pendante per manoj ligitaj al la dika reto. Nekutima sceno por mi. Ankaŭ virinoj havante verdajn silkajn tukojn frotas la reton per ili kaj tiamaniere la silko prenas sanktan econ kaj poste hejme estos uzataj en malfeliĉaj momentoj por helpo! Miaj studentinoj sufloris al mi ke mi petu ion de (Imamo) Reza. Mi pripensis la aferon kaj konstatis ke mi nenion bezonas de LI. Mi havas du belajn filinojn kaj 3 genepojn. Kion mi pli povas deziri? Mi estas kontenta kun mia vivo. Tiam subite en mi diris: Imamo granda povulo gvidu la afganinojn al ilia hejmo!

Sub la moskeo estas 2-4 linia aŭto-subirejo por urba trafiko. Kiam per buso ni



Maŭzoleo de Ferdoŭsi

atingas preskaŭ sub la tombo de Imamo la ŝoforo krias: salutu Imam Reza, tiam la tuta buso laŭte elparolas vortojn de saluto kaj tion oni ripetas trifoje. En buso la viroj sidas en la antaŭa kaj la virinoj en la malantaŭa parto. Intere, meze de buso estas fera stango kiu dividas ilin. Do, kiam mi iris kun Said, li kuris al unua pordo kaj donis mian bileton, eniris buson kaj mi kuris al lasta pordo. Poste mi

devis bone atenti kie li elbusiĝos, ke mi ne restu en buso. Maŝhad havas 3.5 milionojn da loĝantoj. La distanco de hotelo ĝis lernejo estis ĉ. 1 horo. Do ni devis uzi taksion. En ĝi sidas eĉ po 6-7 personoj (du apud ŝoforo),sed se vi pagas pli povas esti eĉ sola. Vespere post instruhoroj ĉiam kelkaj kursaninoj akompanis min ĝis hotelo. Tie tuj kuiris al ni teon kaj ni sidis en hotelo kaj babiladis en Esperanto, vekante scivolemon de aliaj hotelgastoj.Ili ankaŭ ŝatis restadi kun mi en mia ĉambro kaj manĝeti ion kune. Pri la bazaro mi ne deziras multon skribi, kiu rigardis filmojn pri oriento nepre vidis scenojn el bazaro. Tio devus esti aparta rakonto! Se ni parolis esperante dum aĉetado ni pagis pli multe ĉar ili vidis ke ni estas eksterlandanoj. Do, kiam mi deziris ion aĉeti mi iris rigardis kaj poste ili iris, sen mi kaj aĉetis la jam elektitajn objektojn pagante la "lokan" prezon.

Laŭ la konsento kun Vahid Partovinia (kiu ricevis permeson gvidi kurson en Fakultato) mi iris al Universitato de Maŝhad al Matematika Fakultato kie li gvidas E-an kurson. Li nur havis kelkajn studhorojn kun virinoj, ĉar en kurso estas nur 1 viro. Mi montris kiel funkcias la Cseh metodo kaj faris du studhorojn. Poste ili regalis min per kukoj kiuj estis alportitaj. Vahid gitarludis kaj kantis la E.Himnon sed laŭ iomete irana popolmelodio kiun li mem "komponis" kaj estis plaĉa. Vere ĉarmaj iraninoj. Poste mi eksciis ke en la fakultato estas 75% da virinoj. Eble pro tio ke ili deziras montri ke ili samvaloras kun viroj! Estis agrabla renkontiĝo kaj mi esperas ke Vahid havos bonan sukceson kun ili. Multaj aferoj vekis en mi scivolemon legi la Koranon kaj mi scias ke ĝi estas tradukita al E-o, mi deziras certiĝis kelkaj aferoj kiujn mi nur aŭdis sed ne mem kontrolis. Ekz. la viroj rajtas havi 4 edzinojn, sed kiun ajn mi ekkonis havis nur unu!

Post tiu renkontiĝo mi estis invitata por tagmanĝi de studentino Saide Zirak. La unuan fojon mi manĝis iran-maniere sur tapiŝo kiun oni kovras per nilona tuko kaj sur ĝi servas la diversajn kaj bongustajn manĝaĵojn ĉiam nepre havante rizon kun safrano! Kaj joghurto kun ajlo kaj mento.

Poste mi vidis ke tio estas kutimo preskaŭ ĉie. En grandegaj ĉambroj estas nur tapiŝo, eventuale TV en angulo. Nenia meblo. Ĉirkaŭ la muroj estas longaj kusenoj, kiujn oni bezonas apud la muro sidante en "turka sido" babilante, manĝante. Eĉ mi vidis edziĝfeston kiam ĉiuj sidas sur la tapiŝo kaj estas tiel regalitaj. Mi ekskursis kun kursaninoj al Muzeo kaj monumento de



Statuo de Nader-Ŝaho ĉe la muzeo de Maŝhado

Nader Ŝaho kiu estis tre fama ĉar tiam Irano, Afganio kaj Pakistano estis unu lando - La Granda Persio. En la lasta tago de mia restado ni faris ekskurson kun 10 kursaninoj al Tus, loko kie estas la Maŭzoleo de Ferdoŭsi, klasika persa verkisto, fama pro nacia epopeo Ŝahname el XIII-a jarcento. Tie ni vizitis ankaŭ la muzeon kaj lian monumenton. La tomboŝtonon oni tuŝas por havi kontentan vivon kaj inspiron al poezio.

La lastan vesperon kaj nokton mi pasigis en la domo de Diana Karimi kun ŝia patrino, fratino Rona kaj la aninoj de AFESPO Hadise Akbari, Hamide Salehi. Fateme Saĝĝadi. Ĉi lasta estas poetino, kies poemlibro aperis pri suferoj de afganinoj, bedaŭrinde ĝis nun ne tradukita al E-o. Estis memorinda etoso, diversaj specialaĵoj por vespermanĝo kaj agrabla ega gastamo. Ni interparolis pri ilia vivo, kaj pri malebleco reiri al Afganio.Tie estas ĉio detruita kaj ne ekzistas loĝejoj kaj kiuj ekzistas estas multekostaj sed laborlokoj entute ne haveblas, do, ili ne scias kial reiri ĝis kiam io ne ŝanĝiĝos tie?

Fino de la 1-a parto

Fihe Ma Fih

En ĝi estas, kio ĝin enestas

Post forpaso de Moŭlana, aŭ Rumi (1207-1273) oni kolektis liajn intimajn parolojn al liaj proksimuloj kaj eldonis ilin kun la titolo Fihe Ma Fih (En ĝi estas, kio ĝin enestas). Eble la titolo implicas pri simpleco kaj facileco de la enhavo, kiu ne bezonus tian interpretadon, kian postulas aliaj verkoj de Rumi. Kvankam en tiu ĉi libro li tre simple kaj intime parolas al siaj kunuloj, tamen ĝi ankoraŭ ĝuas profundecon atendatan de li. Multaj proponas la legadon de Fihe Ma Fih, kiel enkondukan paŝon al liaj pli komplikaj verkoj kiel la Masnaio kaj Ŝams- gazalaro.

En *Fihe Ma Fih*, ie Rumi i.a. diras:

"La parolo elvenas laŭmezure. Miaj paroloj estas kiel akvo, kiun la mirabo* kondukas al direkto (mirabo estis persono kies laboro konsistis el disdivido de akvo inter la uzantojn: akvisto, akvodistribuisto). Kiel la akvo povus ekscii ke kien la mirabo kondukas ĝin, ĉu al kukumejo, brasikejo aŭ al florejo?

Se multa akvo elfluiĝas, tio montras ke malsataj teroj estas multaj, sed se malmulta akvo elvenas, evidentiĝas ke la teroj malmultas; aŭ temas (nur) pri ĝardeneto, aŭ malgranda kvarmuraĵo (dometo).

Se mi diru mallonge: mi estas ŝuisto. Mi havas multe da ledoj, sed mi (sole) laŭmezure de ĉies piedoj eltondas la ledon kaj kudras ĝin."

Jen traduko de iu parto de *Fihe Ma Fih*:

Ora Kaldrono kaj Rapo

Iu diris: "Mi forgesis ion." Moŭlana (Rumi) diris:

"En tiu ĉi mondo, se vi ĉion forgesu, ne gravus; nur unu aferon oni ne devas forgesi: Vi venis en la mondon por iu laboro, kion se vi ne plenumu, vi faris nenion. Homo povas fari ion, kion nek la ĉielo nek la tero nek la montoj kapablas fari, sed vi diras: 'Mi povas fari multajn (diversajn) laborojn', tiu ĉi via diro, estas kiel tio ke, vi uzu multekostan glavon reĝecan, kiel viand-tranĉilon, kaj vi diru: 'Mi ne lasis la glavon senlabora'; aŭ vi kuiru rapon en ora kaldrono; aŭ gem-ornamitan tranĉilon vi enigu en la muron por pendigi rompitan kukurbon. Ho nesciulo! tiun ĉi funkcion ankaŭ ligna najlo povas plenumi. Ne vendu vin tiel malkare, ĉar vi estas tre multkosta.

Vi pretekstas ke: 'Mi pasigas la tempon



plenumante utilajn aferojn. Mi lernas sciencon, mi studas filozofion, religiaĵon, logikon, astrologion kaj medicinon', sed ĉio ĉi estas por vi, vi ne estas por ili. Se vi bone pripensu, vi komprenos ke vi estas la ĉefaĵo, kaj ĉio ĉi estas flankaĵoj. Vi ne scias ke kiaj mirigaĵoj kaj kiaj senfinaj mondoj ondas en vi. Vere, tiu ĉi korpo de vi, estas via ĉevalo, kiu manĝas el la mondo-fojnujo. La manĝaĵo de la ĉevalo, ne estas via manĝaĵo.

Tagon, Maĝnuno ekintencis iri al la loĝujo de Lejlio (Lejlio kaj Maĝnuno estas la plej famaj geamantoj en la persa literaturo). Senpacience kaj kun koro amoplena li (Maĝnuno) sursidis iun kamelon kaj ekvojis. Survoje, de tempo al tempo, li tiel enreviĝis pri Lejlio, ke li (tute) forgesis la kamelon. Ankaŭ la kamelo havis idon angule de la vilaĝo (de Maĝnuno). Ĉiam, kiam ĝi trovis Maĝnunon sinforgesinta, reiris al la vilaĝo, kaj atingigis sin al la ido. Kiam ajn Maĝnuno rekonsciiĝis, ekkomprenis ke li jam reiris farsangojn* (ĉiu farsango estas ĉ. 6 km). Tri monatojn li restis survoje. Do, li komprenis ke tiu kamelo ne estas samvoja kun li. Li ĝin forlasis kaj piede ekvojiris al Lejlia loĝloko."

Tradukis: (f-ino) Lumina Ebrahimpur

FONTO:

MOŬLANA (RUMI), Ĝalal-ed-Din Mohammad. *Fihe Ma Fih* (En ĝi estas kio ĝin enestas), kompilis Mohammad Kazem Mazinani, Bildoj far Nilufar Mohammadi, Tehrano: NaŝrePejdajeŝ, 2002 (4a eld.), 120 p., p. 15-19.

IRANA ESPERANTISTO



"...bonŝance venis
***'IRANA ESPERANTISTO'**,*
kiu diversnuance kaj riĉe proksimigas la kulturon de tiu ĉi fora lando. Jen per prezento de la materia kulturmonumento de tiu ĉi lando, granda turisma atrakciaĵo devenanta el la 10-a jarcento Bam-Citadelo, la plej granda adoba kontruaĵo en la mondo, kalkulita de UNESCO al la universala kulturheredaĵo..."
Radio Polonia, Barbara Pietrzak.

IRANA ESPERANTISTO estas internacia kultura sezon-magazino sendependa. Legante ĝin vi povas:
Konatiĝi kaj kun plej grandaj antikvaj persaj poetoj/mistikuloj ...
Sciiĝi pri gravaj eventoj en Irano, ekz-e en la 5a n-ro estis pli ol dek paĝoj pri Ŝirin Ebadi, NobelPacPremiito en 2003.
Lerni pri plej allogaj vidindaj lokoj (historiaj); ĝis nun …
IRANA ESPERANTISTO aperas ĉiu-sezone sur 56 paĝoj, ĝi estas 29cmx20.5cm, kun koloraj kovrilpaĝoj, ISSN 1728-6174.
Pliaj informoj pri la magazino, kune kun enhavtabelo alireblas en:
http://eo.wikipedia.org/wiki/Irana_Esperantisto
Jen informfontoj pri la magazino en la persa:
http://www.sabzandishan/com ,
http://www.magiran.com/subscription.asp?mgID=2899

Interesita? Jen la Abon-informoj:
Jara abontarifo por internacia samideanaro:
Orienta Eŭropo, Azio, Afriko, Sudameriko: 15 Eŭroj.
Okcidenta Eŭropo: 20 Eŭroj.
Nordameriko, Japanio, Koreio, Oceanio: 25 Eŭroj.
Vi povas pagi la abonkotizon aŭ/kaj subtensumon al UEA, kodo: **iece-h**.

Perantoj de
IRANA ESPERANTISTO

Belgio:
FEL
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen

POLLANDO:
Stanislaw Smigielski
Ul. Krasickiego 12/6
PL-47-206 Kedzierzyn-Kozle

USONO:
Joel Brozovsky
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
1257 Hollis St
Emeryville CA 94608-2514, Usono
Por eventualaj legantoj en Usono: por la jaro 2004, la revuo "Irana Esperantisto" estas abonebla pere de la abonservo de ELNA (PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, tel +1 510 653 0998, retadreso: elna@esperanto-usa.org, ttt-ejo: http://www.esperanto-usa.org kaj iru al "Books & Other Materials" kaj poste al "Subscriptions").
Perantoj estas serĉataj en aliaj landoj!

Abonilo
Nomo: Familia Nomo: Aĝo: De kiu numero:
Ĝis kiu numero:
Adreso:

Poŝt-kodo: Telefono: E-poŝto:

Sendu la abonilon al la suba adreso (irananoj sendu kune ankaŭ kopion de pagdokumento): Sabzandiŝan Instituto, P.O.Kesto 17765-184, Tehrano, Irano.
E-poŝto: info@sabzandishan.com
Bonan legadon!
Irana Esperantisto